

HORIZONTO

II-a JARO N-o 11 (5)
SEPTEMBRO-OKTOBRO 1977

LITURA KAJ INFORMA REVUO



Prof. dro. jur. Ivo Lapenna dum la festparolado.

ILTEPROMESA KONFERENCO

BELETRO

POSTTAGMEZO EN EL PRADO

DE LA NEŬTRALA ESPERANTO MOVADO

HORIZONTO

Direktorino

Inés Gastón

Redakta Komitato

Fernando de Diego

Juan Régulo

Jean Thierry

Red. kaj Adm.

Inés Gastón

P.º Marina Moreno, 35

Telf. (976) 22.05.21

Zaragoza-1 (Hispanujo)

Eldonkvanto 1.000 ekzempleroj

Dumonata revuo

Prcita en Zaragoza

ĉe "Tipografia C. Boloix"

str. Reina Fabiola, 7, Zaragoza-8

Leĝa Depono Z-133-76

N.º 5 - Septembro - Oktobro 1977

E N H A V O

MULTPROMESA KONFERENCO (Jean Thierry)

3-a INTERNACIA KONFERENCO DE N.E.M. Raportas (H. V. Rasmussen)

KONKLUDOJ. H. V. Rasmussen, prez. de la Konferenco

MANIFESTO 77 DE LA ESPERANTO MOVADO SKIZO PRI KUNLABORO KIBERNETIKE-PEDAGOGIA (Helmar Frank)

LA INGENIA HIDALGO DON QUIJOTE DE LA MANCHA —en Esperanto— (G. Mora i Arana)

BELETRO

Valoroj (Edwin de Kock)

Mia sonĝo (trad. J. Ben-Alter)

Dormetas la urbeto (trad. J. Ben-Alter)

Iam mi promenis (trad. J. Ben-Alter)

Posttalmezo en El Prado (B. Golden)

Amuza legado de Til'Strigospegul' (trad. R. Sulco)

MODELO DE EUROPA-INTERNACIA LERNEJO. Informas (H. Sonnabend)

LA HOMAJ RAJTOJ EN LA EUROPA KONSILANTARO (Jean Thierry)

MAJSTROVERKO DE FUSADO (Jaakko Kelohonka)

KION VI NE LEGOS ALILOKE

La lasta tendaro de junaj esperantistoj en Herbortice - Bohemio (V.)

TRA LA ESPERANTO-GAZETARO. Raportas (Jean Thierry)

LIBROJ SUB LA LUPEO. Recenzas (J. Thierry kaj S. Gumá)

4-a INTERNACIA KONFERENCO DE N.E.M. (Organiza Komitato)

KIEL ABONI?

Abonojn al "Horizonto" akceptas la Administracio: Inés Gastón, Paseo Marina Moreno, 35, Zaragoza-1, Hispanujo. Pĉk. Zaragoza 00428398 (Jarabono 500 ptoj.), aŭ la sekvantaj.

PERANTOJ

Aŭstrujo:

Dro. Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 GRAZ. Pĉk. Graz 1257.845. Jarabono: 160,— S.

Britujo:

Geoffrey King, 14 Elmdale Road, LONDON N13 4UL. Pĉk. 37.507.9106. Jarabono 5 £.

Danlando:

Peter Zacho, Amosevej 5 A, DK-2700 BRØNSHØJ. Bank-konto, 354-800468, Bikuben Jernbanalle 34, Vanløse. Jarabono: 60,— D Kr.

Finlando:

Finna Esperanto-Librejo, PL 221, SF-70101 KUOPIO 10, Pĉk KU 152801-5. Jarabono: 38,— F. Mk.

Francujo:

André Bourdeaux, 91 rue de la Chapelle, F-75018 PARIS. Pĉk. Paris 21.670.96 V. Jarabono: 40,— Fr.

FR Germanujo:

Heinrich Müller, Mommsenstrasse 5, D-3000 HANNOVER 1. Pĉk. Hannover 120 854-301. Jarabono: 24,— DM.

Grekujo:

K. G. Eliopulos, 130 El. Venizelos Ave., NEA SMIRNI —Attiki—. Bank-konto Nro. 040-753362-40, Nacia Banko de Greklando Eolu-str. Jarabono: 380,— Grekaj Drakmoj.

Hungario:

Tibor Szabadi, Pf. 66, H-8800 NAGYKANIZSA. Jarabono: 180,— Ft.

Israelo:

Ben-Alter Jehiel, P. O. B. 379, PETATIKVA. Pĉk. Bank Hadoar, 4458548. Jarabono: 84 izr. liroj.

Kanado:

Kriss Smilga, 34 Martin Road. TORONTO Ont. M4S 2V2. Jarabono: 8,— \$.

Luksemburgo:

Albert Wickler, 1 rue de Kehlen, L OLM. Konto N.º 5603/6196-3, CEE (Caisse d'Epargne de l'Etat). Jarabono: 380, luksemburgaj frankoj.

Nederlando:

Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat, 172, HAGO 2011, Poŝtkonto 162626. Jarabono: 25 Gld.

Rumanujo:

Mihail Petre Dungeanu, P.O. Box 56 R-5806 SUCEAVA.

El ĉiuj aliaj landoj oni pagu al unu tiuj perantoj, ĝis peranto en tiu lando estos trovita. Personoj pretaj funkcii kiel perantoj, bv. sin turni al la direktorino.

MULTEPROMESA KONFERENCO

Jen okazis ja la 3-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado!

Se meze de vasta Universitato iom improvizita (ĉar preparita en ĉirkaŭ nur tri monatoj) restis la 1-a Konferenco same kiel en granda urbego iel disigema la 2-a, ĉi tiu 3-a el organiza vidpunkto bonege efektiviĝis tra la moderne ekipita domaro de Altlernejo Krogerup.

Certe la Altlernejo estas ideala kadro por konferenco; — ĝia situo en unu el la plej ĉarmaj partoj de Danlando, meze de arbaro, proksime de kampoj kaj strandoj, de vilaĝoj kaj kasteloj, jam igas ĝin plej agrabla deirpunkto por kulturaj ekskursoj ĉirkaŭ «Humblebæk», la «Lupol-rivero»; — sed ankoraŭ pli celtaŭga montriĝis la lerneja instalajo per la loĝoĉambroj, la manĝo- kaj prelego-salonoj, la apartaj salonetoj por ripozo kun trinkado kaj muziko kaj por diersaj administraj, libroservaj aŭ alicelaj kunvenetoj, same kiel ankaŭ la akceptejo provizita je komfortaj foteloj indaj je luksa klubo!

Kio krome estis elstare rimarkinda, tio estis la nelacigebla sindonemo de ĉiuj membroj de la Organiza Komitato, ĉiam pretaj helpi la gekonferencanojn kaj faciligi al ili la solvon de iu ajn problemo. Tial plej glate sinsekvis inter aliaj la Interkona Vespero, la Balo kaj la lasta Amikeca Vespero, kiun konjekteble ĉiuj ne tuj estas pretaj forgesi! Ja regis tia konkorda etoso, ke preskaŭ ĉiunokte pluraj ne povis frue decidiĝi por enlitiĝo. Apartajn dankesprimojn meritas s-ro H. V. Rasmussen pro la ĝenerala administrado de la aranĝo, s-inoj Lis Thune kaj Birthe Zacho precipe pro la vesperaj etosoj, s-ro Peter Zacho kaj s-ino Rie Krainer pro plej diversaj helpoj, s-ro Mogens Groth pro la ekskursaj preparoj kaj s-ro Pierre Gaborit pro la gvidado de la vizito al la muzeo Louisiana.

Ĉe tiaj kondiĉoj ne estas mirinde, ke la kerna, labora parto de la konferenco plej pozitive disvolviĝis. El tri partoj konsistis la programo: — Ideaj aspektoj de la esperantismo en la lumo de la aktuala krizo en la Esperanto-Movado — Organizaj demandoj de la Neŭtrala Esperanto-Movado — La lingva problemo en la nuntempo kun aparta konsidero al la bezonoj de Eŭropo. Per aparta artikolo ĉiu povos informiĝi pri la prelegoj, debatoj kaj konkludoj.

Sed la 3-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado per pozitivaj paŝoj montris, ke la estonteco de Esperanto jam rebrilas, kiam ĝesamideanoj restas fidelaj al la origina tradicio de la esperantismo, nome la HUMANECA INTERNACIISMO, kiun senĉese esprimis siavice d-ro L. L. Zamenhof, prof. E. Privat kaj prof. Ivo Lapenna.

Hej! Por pli firmigi tiun idealon, ĉiuj de nun preparu la 4-an Internacian Konferencon en Jaca!

J. T.

SALUTO AL LA TRIA KONFERENCO DE LA NEM EL ORIENTA EŬROPO

La 3-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado ricevis plurajn bondezirajn leterojn kaj telegramojn el diversaj landoj, inkluzive tiujn de Orienta Eŭropo. Jen unu el ili:

«Akceptu sinceran dankon pro *Horizonto*. Hieraŭ mi ricevis ambaŭ numerojn. Tre interesa legaĵo. Mi posedas ankaŭ la Manifeston 77. Mi intencas retajpi ĝin por miaj geamikoj.

«En la nunaj tagoj okazas la Konferenco de NEM. Ni estas pense ĉe vi. En nia animo ni ĝuas tiun sinceran etoson, kiu regas dum la konferenco. Ni sendas pensojn de estimo kaj ŝato al tiu kremo de la esperantistaro, kiu kunvenas en Danlando. Espereble en la estonteco iam venkos la sana prudento kaj ni povos ĉeesti ian similan konferencon.

«Por subteno de NEM kaj por *Horizonto* mi sendas novajn neuzitajn poŝtmarkojn, plejparte folietojn.»

(Subskribo ellasita.)

3-a INTERNACIA KONFERENCO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

Konciza raporto

S-ro Heinrich Müller, la organizinto de la Konferenco s-ro Peter Zacho, s-ino Rie Krainer, s-ro M. Groth kaj la vicprezidanto de la Konferenco dipl. mat. H. D. Maas en la prelegejo de la konferencejo.



Unue: Koran dankon pro la sukceso!

Al ĉiuj, kiuj aliĝis al la konferenco — ĉu por fakte partopreni ĝin, ĉu por doni sian moralan kaj ekonomian subtenon — aŭ apogis ĝin per monsumo, tre koran dankon. Tiuj, kiuj ĉeestis en Humlebæk, per sia aktiva kaj lojala partopreno en la diskutoj donis al la konferenco stampon de sincera kaj harmonia kunlaborado promesanta fruktodonan agadon de la Neŭtrala Esperanto-Movado en la estonteco, kio kune kun la bonegaj prelegoj kaj paroladoj, levintaj la konferencon al tre alta kultura nivelo, certigis la sukceson.

Aldoninde estas, ke la sukceso estas konstatebla ne nur sur la intelekta flanko, sed ankaŭ sur la materia: dank' al la malavareco de la konferencanoj kaj apogintoj la kontaro montros kiel finan rezulton profiton verŝajne superantan 5000 danajn kronojn.

Tial, denove, tre koran dankon al ĉiuj!

Ni donos ĉi tie koncizan raporton pri la ĉefaj eroj de la konferenco. Pli ampleksa referaĵo estos sendita al la aliĝintoj, kaj espereble ĉiuj prelegoj aperos en *Horizonto*.

Aperis Dua Eldono de HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO

Laŭ la programo la enkonduko de la Interkona Vespero (sabaton 23/7) estus prelego de la prezidanto de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, *Helmut Sonnabend*, sed pro ties bedaŭrinda malsano kaj sekva neĉeesto la prelego ne povis okazi. Tamen estis eble anstataŭigi tiun programeron per alia.

Tie ĉi ne estas la loko por informi pri la malfacilaĵoj de la *Eldonejo Horizonte* pri la aperigo de la Dua Eldono de *Hamburgo en Retrospektivo* planita por la aŭtuno de 1976. Estu menciita nur la ĝojiga surprizo, ke unu horon antaŭ la komenciĝo de la Interkona Vespero alvenis la unuaj 500 ekzempleroj de la libro. Tial la aŭtoro prof. d-ro *Ivo Lapenna* povis prezenti la noveldonon kun ties novaj ĉapitroj, skizante la evoluon post la aperigo de la Unua Eldono.

La Inaŭguro

La oficiala malfermo de la konferenco okazis dimanĉon antaŭtagmeze. Post la bonega parolado estis prezentitaj salutoj de Esperanto-grupo en G.D.R., ges-roj Günther kaj Maria Becker, F.R.G., ges-roj Isaj kaj Anna Dratwer, Israelo, kaj de la redaktoro de *Horizonto*, f-ino Inés Gastón, Hispanio, kiu samtempe invitis al venontjara konferenco en Jaca (Pireneoj).

En la prezidantaron de la konferenco estis elektitaj: cand. ocon. *H. V. Rasmussen* (prezidanto), s-ro *Jean Thierry* kaj dipl. mat. *H. D. Maas* (vicprezidantoj) kaj dipl. ekon. *P. Bo Larsen* (sekretario).

La festparolado en la kadro de la Inaŭguro estis samtempe enkonduko al unu el la ĉefaj temaroj de la konferenco:

Ideaj aspektoj de la esperantismo en la lumo de la aktuala krizo en la Esperanto-movado

La paroladon prezentis prof. d-ro *Ivo Lapenna* sub la titolo *Esperanto — ĉu nur instrumento de komunikado, disigebla de humaneca internaciismo?*

Ĝi formiĝis kiel komento al la artikolo de prof. Lapenna en *Horizonto*, n-ro 10, «Proleta internaciismo» kontraŭ *humanecan internaciismon*. La lasta estas bazita sur la ideoj de Zamenhof pri «frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj» kaj renkontiĝo de «neaj angloj kun francoj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj» (Bulonja Kongreso, 1905). En tio estas la kerno de la humaneca internaciismo, kies neŭtraleco inkluzivigas politikon, naciecon, rason kaj religion, dum la proleta internaciismo havas fortajn ekskluzivajn punktojn en sia programo.

En la posttagmeza kunveno s-ro *Jean Thierry* prelegis pri *Etikaj valoroj de la esperantismo*. La prelego emfazis per komparo kun etikaj kaj filozofiaj ideoj esprimitaj dum la konata kulturepoko de la homaro, ke la esenca ero en la «interna ideo» de la lingvo neŭtrale homa estas: *nenion altrudi al alia*, jen la spirito neŭtrale homa de justecon al la fundamentaj esperantismaj ideoj, s-ro *Thierry* starigis la demandon, ĉu la Esperanto-movado estas ankoraŭ fidela al tia humaneca internaciismo.

Dum la posta diskuto prof. *Lapenna* rimarkigis al s-ro *P. Diksztejn*, ke NEM ne estas, nek estu organizaĵo. La nomo indikas la daŭrigatan sintenon konforman al la tradicio ekde 1887.

Fine de la diskuto s-ro *Thierry*, informinte, ke Amnestio Internacia ekagis por liberigi rusan esperantiston, *Jurij Belov*, kiu nun, post kelkara enkarcerigo, estas tenata en mensa hospitalo en Siberio, sugestis, ke ankaŭ la Esperanto-movado intervenu konforme al sia humaneca sinteno. La kunveno petis la konferencan prezidantaron pritrakti la aferon.

Generala kunveno pri organizaj demandoj de la Neŭtrala Esperanto-Movado

Prof. *Lapenna* en la ĝenerala kunveno lundon informis laŭ sciigoj de la redaktorino, f-ino *Inés Gastón*, ke la revuo *Horizonto* ne havas specialajn problemojn, kaj ke ĝia daŭra aperado estas certigita. Dum la post diskuto evidentiĝis samopinieco pri tio, ke principe la enhavo de la revuo estas tre kontentiga, sed eble estus utile limigi la spacon de poezio favore al prozo kaj, se eble, aldoni iom da humuraĵoj. Oni konsilis eviti tro fortajn esprimojn kaj troan sarkasmon en kritikaj artikoloj. La kunveno esprimis siajn laŭdon kaj dankon al la redaktorino pro bona laboro.

Pri agadgrupoj informis s-ro *P. Zacho*, ke tiaj ekzistas en Francio, Grekio, Hispanio kaj Danlando, kaj ke diversloke troviĝas unuopaj agantoj. S-ro *Thierry* atentigis, ke la agadgrupoj ne konkurencas kun la landaj asocioj, kaj s-ino *Lis Thune* instigis al la grupoj doni moralan apogon al la klopodoj por bremsi la nedezirindan evoluon de UEA, kaj ŝi dankis al prof. *Lapenna* pro lia senlaca laboro tiurilate.

Por la 4-a Internacia Konferenco de la NEM estis du invitoj: al Ateneo kaj — kiel antaŭe menciite — al Jaca, Hispanio. La kunveno decidis akcepti la inviton al Jaca en 1978, se eble en la semajno 22-a - 29-a de julio, kaj rezervi la jaron 1979 por Ateno.

La lingva problemo en la nuntempo kun aparta konsidero al la bezonoj de Eŭropo

La prelegserio pri tiu temaro okazis mardon kaj merkredon.

En sia enkonduka prelego prof. d-ro *Ivo Lapenna* atentigis, ke nur post la dua mondmilito eblis krei vere kunlaborajn organizaĵojn en Eŭropo. La unua atingajo estis la Eŭropa Konsilantaro kun la Eŭropa Konvencio pri Homaj Rajtoj kaj Homrajta Tribunal, al kiu povas turni sin unuopuloj. La diversaj internaciaj organizaĵoj en orienta kaj okcidenta Eŭropo frontas lingvajn problemojn, kiuj fariĝas pli kaj pli ĝenaj, sed restas nesolvitaj. La Fina Akto de Helsinki rekomendas intensigon de lingvoinstruado en la lernejoj, sed la rekomendo ĝis nun kaŭzis eĉ ne unu ŝanĝon en iu lerneja regularo. Solvo per tradukoj malfaciliĝas pro la fakto, ke juraj terminoj en du lingvoj preskaŭ neniam identas centprocente. La ĝeneraligo de la Internacia Lingvo en Eŭropo estu nur instigo al la cetera mondo, ĉar nia celo ampleksas la tutan mondon.

La internacieco de Esperanto kaj la karaktero de la hindeŭropaj elementoj en ĝi

En sia prelego prof. d-ro *F. Pennacchietti* menciis, ke laŭ strukturo Esperanto similas (hazarde) al la turka-altaja lingvogrupo. Pro sia kombino de libera frazokonstruo kun simpla morfologio ĝi malsimilas al naciaj lingvoj. La aparta fizionomio de Esperanto estas kaŭzita de la lingvokonoj de Zamenhof. La sonsistemo similas al tiu de la novhebrea kaj jida lingvoj, sed kun fortaj influoj de la rusa, pola kaj germana. La vortotrezoro devenas ĉefe de la latinidaj lingvoj, sed la vortfarado montras mildigitan germanan de tiu en la germana lingvo, kaj la uzo de prepozicioj kaj akuzativo sekvas la germanan kaj baltoslanajn sistemojn. La baltoslavaj lingvoj donis la modelon ekzemple de la tempoformoj kaj participoj (neekzisto de helpverbo «havi») kaj de uzo de adjektiva aŭ prepozicia konstruo anstataŭ kunmetaĵo.

Generala kunveno pri la Manifesto 77 k.a.

En la ĝenerala kunveno mardon vespere prof. *Ivo Lapenna*, resuminte la informojn en *Horizonto*, n-ro 10, p. 92-93, pri la de li iniciatita *Manifesto 77 de la Esperanto-Movado: Por Paco en Libereco — Por Libereco en Paco*, proponis, ke la konferenco per sia akcepto donu apogon al ĝi.

S-ro *Fr. Simonnet* (nova komitatano B de UEA) deklaris, ke li — kvankam li persone plene akceptas la enhavon de la Manifesto — ne povas subskribi ĝin, ĉar laŭ lia opinio tia opiniesprimo ne estas tasko de la Esperanto-movado, ĉu neŭtrala aŭ ne. Al onio s-ro *Thierry* respondis, ke la Manifesto per sia apogo al la homaj rajtoj plene akordiĝas kun la Statuto de UEA. Pluraj konferencanoj atentigis, ke la Manifesto ne estas nur unudirekta: ĝi pledas por observado de ĉiuj homaj rajtoj ĉie en la mondo.

Je la voĉdono la propono estis preskaŭ unuanime akceptita de la konferenco (unu kontraŭa kaj unu sindetena voĉoj).

S-ro *H. V. Rasmussen*, referencinte al la kunveno lundon posttagmeze, prezentis informojn pri la rusa esperantisto Jurij Belov, ricevitaĵoj de la sekcio de Amnestio Internacia en Kopenhago, kaj la proponojn de la prezidantaro tiurilate: 1) telegramo al la Prezidanto de la Prezidio de la Supera Soveto de USSR, L. I. Breĵnev, pri apogo de NEM al Amnestio Internacia rilate ĝian intervenon favore al Jurij Belov, 2) telegramo al la Universala Kongreso de Esperanto en Reykjavik kun instigo al simila ago, 3) letero al la internacia sekretariejo de Amnestio Internacia en Londono pri la afero.

La konferenco unuanime akceptis la proponojn, aldoninte, ke ankaŭ al la SAT-kongreso en Augsburg estu sendita telegramo kun sama enhavo kiel tiu al la Universala Kongreso en Reykjavik. La teksto de la telegramoj estas aldonitaj al tiu ĉi raporto.

Strategio oficialigi la Internacian Lingvon en la estonta Eŭropa Unio

Merkredon matene la konferenco rekomencis la pritrakton de la eŭropa lingva problemo. Per sia prelego sub la supra titolo prof. d-ro *H. Frank* celis atentigi pri la farendaj paŝoj por enigi Esperanton kiel suplementon al la uzataj naciaj lingvoj en kiel eble plej multajn rilatojn. Por enigi novaĵojn en socion necesas motivo kaj strategio, sed laŭ lia opinio pri Esperanto ĝis nun aŭ ne ekzistis strategio, aŭ la motivo estis nesufiĉa. Tri grupoj de la socio estas nepre pozitivigendaj kaj estu «atakataj» samtempe pro ilia interdependenco: la klerigistaro, la politikaj aŭtoritatoj kaj la fakaj (sciencaj) rondoj. En tiuj grupoj troviĝas rilate al Esperanto rezignuloj, kontraŭuloj kaj prudentuloj, kies vidpunktoj kaj argumentoj estis ilustritaj per ekzemploj.

Prof. Frank pritraktis la eblajn aplikendajn metodojn kaj raportis pri la agado de la Eŭropa Klubo en Paderborn, kie renkontiĝas esperantistoj kun neesperantistoj laborante laŭ tiaj metodoj.

Cu komputero povas helpi al solvo de la lingva problemo en Eŭropo?

Merkredon antaŭtagmeze sekvis la prelego de dipl. mat. *H. D. Maas* pri la demando pri la uzebleco de komputeroj por tradukado. Esploroj pri tio okazis dum jardekoj, kaj aŭtomataj tradukoj inter kelkaj lingvoj nun pli-malpli eblas kaj donas helpon en kelkaj situacioj, sed je tre altaj kostoj. Ekzemplon donas la Eŭropa Komunaro, kiu uzas aŭtomatan tradukadon por ĉ. 17.000 resumoj jare. La Esperanto-movado devus subteni la evoluon, ĉar la Internacia Lingvo estas tre taŭga tiurilate kaj eble povos utili kiel «ponto» je tradukado inter naciaj lingvoj.

Internacieco kaj nacieco en lingvo kaj muziko

Merkredon vespere prilumis tiun temon du prelegantoj, prof. d-ro *F. Hoerbuerger* kaj doc. *Birthe Trærup*.

Elirante de citaĵo, «Nur la muziko estas mondlingvo, kaj ni ne bezonas traduki ĝin; jen animo parolas al animo», prof. Hoerbuerger priparolis la komunajn elementojn troveblajn en la primitiva muziko de diversaj regionoj: simetria ritmo en akordo kun la simetria korpo kaj skalo en akordo kun la homa orelo. Aliflanke ekzistas regiona muziko kun tute aparta karaktero, tamen ofte kun «fremdvortoj»; precipe la eŭropa muziko penetris ekzemple en la azian kun la negativa sekvo, ke naciaj ecoj kelkloke preskaŭ malaperis. Distra muziko pli kaj pli fariĝas internacia afero de mono kaj politiko forpuŝanta la nacian distromuzikon. Feliĉe oni nun multloke flegas la popolmuzikon tiel konservante la muzikan multkolorrecon.

Doc. Birthe Trærup poste ilustris la prelegon per magnetofone prezentataj muzikaĵoj: Mozart kiel ekzemplo de senpere komprenata muziko de la eŭropa kulturo kontraste al japana opera muziko, alpa korno donis ekzemplon de primitiva instrumento, dum ĉina opera muziko demonstris la eŭropan influon k.t.p.

Generala diskuto pri la lingva problemo

La jaŭda antaŭtagmezo estis dediĉita al finpritrakto de la temaro de la prelegserio de la du antaŭaj tagoj.

Prof. *H. Frank* proponis koncentri la diskuton sur la konkretaj agoj: simpativarbado, fakaj instancoj, instruado, politika agado kaj organizo de agadoj, kiu propono estis akceptita. Prof. Lapenna emfazis, ke tiuj agadoj estas reciproke dependaj kaj precipe dependaj de la lasta, la organizado, kaj proponis, ke la Eŭropa Klubo en Paderborn (EKP) estu centro de la agado en Eŭropo, ke EKP ellaboru konkretan planon, ke tiu estu vaste diskonigata, ke EKP faru varban kampanjon, kaj ke EKP starigu reton de kunlaborantoj en eŭropaj landoj. Prof. Frank simpatiis al tiu propono, sed atentigis, ke necesas akcepto fare de la estraro de EKP, kaj ke fina planado povos okazi dum la jarkunveno de EKP la 26-an de novembro 1977 en Paderborn. Ankaŭ la ceteraj konferencanoj trovis la proponon rekomendinda.

Generala kunveno pri konkludoj de la konferenco

Jaŭdon vespere la konferenco kunsidis por decidi pri la publikigotaj konkludoj de la konferenco.

Pierre Zacho, prof. dro. jur. Ivo Lapenna, la prezidanto de la Konferenco cand. oecon. H. V. Rasmussen, vicprezidanto de la Konferenco s-ro Jean Thierry kaj prof. dro. Helmar Frank kun la respektivaj familianoj antaŭ la konferencujo.



Antaŭ la pritrakto de tiuj estis voĉlegita letero de s-ro Fr. Simonnet (forvojaĝinta al Reykjavik). Li konsentis kun prof. Lapenna pri la minaco de politika enmiksigo en UEA, sed denove emfazis, laŭ sia koncepto de senkompromisa neŭtraleco, ke ne estas tasko de la Esperanto-movado fari deklarojn pri tio, kaj ke batalado por proklamitaj principoj (homaj rajtoj) ne estas afero de UEA. Ĉar la letero pritemis demandojn, pri kiuj la konferenco jam decidis, ne okazis diskuto pri ĝi.

La prezidantaro prezentis proponon pri konkludoj, kiujn oni diskutis kaj voĉdonigis punkton post punkto, escepte de la jam en antaŭa kunveno deciditaj. La punktoj II, 2 kaj III, 1-2 estis unuanime akceptitaj, la ceteraj preskaŭ unuanime (sen kontraŭaj voĉoj). La konkludoj estas aldonitaj al tiu ĉi raporto.

Fermo de la konferenco

En la jaŭda vespero okazis la oficiala fermo de la konferenco, kies programon tiurilate la prezidantaro estis ŝanĝinta, konsiderante, ke pluraj konferencanoj informis pri sia neebleco resti ĝis lundo tagmeze, kaj ke cetere ne estos kunvenoj vendredon kaj sabaton.

S-ro H. D. Maas dankis la aranĝintojn pro la farita laboro kaj la partoprenantojn pro la spirito de humaneca internaciismo, kiu regis dum la konferenco.

S-ro H. V. Rasmussen — post dankoj al siaj gekolegoj en la organiza komitato kaj la prezidantaro pro bona kunlaboro, al la prelegintoj pro iliaj altnivelaj kontribuoj, al prof. Lapenna pro konsiloj kaj helpo dum la preparoj kaj al ĉiuj konferencanoj pro la bona etoso dum la konferenco — deklaris la konferencon fermita.

Ekskurso al Norda Selando

Vendredon oni entreprenis la tuttagan ekskurson al Norda Selando gvidatan de s-ino Lis Thune kaj s-ro Mogens Groth. Dum la vetero la antaŭajn tagojn estis tre varia kaj ne varma, tiun tagon la veteraj dioj benis la konferencanojn per seninterrompa sunbrilo. Per aŭtobuso oni veturis al Elsinoro por rigardi interesajn malnovajn domojn kaj la kastelon Kronborg, poste laŭ la marbordo tra konataj banlokoj al Dronningmølle (lunĉa paŭzo) kaj Rageleje kaj de tie al Hillerød, kie bedaŭrinde la tempo ne sufiĉis por rigardi la kastelon Frederiksborg ankaŭ interne.

Vespere la konferencanoj kolektiĝis en finfesteto, dum kiu s-roj Roger Bernard kaj Jean Thierry en paŭzoj inter la dancoj distris per legado kaj kantado el la verkoj de Raymond Schwartz, tiel memorigante pri a siatempa esperantista kabareda vivo en Parizo.

Finvortoj

Tiun ĉi raporton komencas optimismaj vortoj pro la sukceso de la konferenco. Nun de estas tempo por konfesi, ke tian optimismon ne havis la organiza komitato en la tempo antaŭ kaj tuj post la malfermo de la konferenco. Estis evidente, ke la nombroj de aligintoj kaj efektivaj partoprenantoj nur malmulte superos tiujn de la pasintjara konferenco en Parizo, kaj en la lastaj tagoj antaŭ la malfermo eĉ alvenis sciigoj de pluraj aligintoj, ke pro neatenditaj malagrablaĵoj ili ne povos veni, ekzemple de tiel «firmaj kolonoj» de NEM kiel f-ino Marianne Vermaas kaj d-ro Klaus Perko. Plie la organiza komitato, homoj senspertaj pri aranĝado de konferenco, devis konstati certajn mankojn en la organizado, kiujn la membroj riproĉis al si, kaj sekve la komitatanoj en la komenco de la konferenco iom dubis, ĉu estos bazo por estontaj konferencoj de NEM.

Sed dum la disvolviĝo de la programo kaj je la konstato pri la favoraj reagoj de la konferencanoj (el 8 landoj kaj 10 nacioj) al ĝiaj kvalitoj la pesimismo devis cedi. Tial la organiza komitato ankaŭ ĉi tie esprimas sian koran dankon al ĉiuj partoprenintoj pro iliaj intelektaj kaj ekonomiaj kontribuoj al la sukceso, aldonante varman saluton al la organiza komitato de la venontjara 4-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado en Hispanio.

Gis revido en Jaca!

H. V. Rasmussen

A L D O N O J

Telegramoj de la Konferenco

- 1) al la Prezidanto de la Prezidio de la Supera Soveto de USSR, L.K. Brejnev:
Tria Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado apogas la agadon de Amnestio Internacia por liberigo de esperantisto Jurij Belov en mensa hospitalo en Krasnojarsk.
- 2) al la Universala Kongreso de Esperanto, Reykjavík:
Amnestio Internacia intervenas por liberigo de esperantisto Jurij Belov kontraŭleĝe tenata en mensa hospitalo de Krasnojarsk stop Tria Internacia Konferenco de NEM apogas tiun agadon de Amnestio Internacia pledis samcele che sovetaĵaj aŭtoritatoj kaj proponas al UK agi same.
- 3) al la SAT-kongreso en Augsburg kun simila enhavo kiel sub 2).

KONKLUDOJ DE LA 3-a INTERNACIA KONFERENCO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

La 3-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado okazinta en Humlebæk de la 23-a ĝis la 30-a de julio 1977 faris jenajn decidojn:

- I. Aŭdinte kaj diskutinte la prelegojn de prof. Ivo Lapenna kaj s-ro Jean Thierry pri la «Ideaĵ aspektoj de la esperantismo en la lumo de la aktuala krizo de la Esperanto-Movado», la Konferenco:
 1. Rekonfirmas la valoron de la «Deklaro de Principoj» akceptita de la 1-a Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado kaj insiste alvokas la Esperanto-organizaĵojn kaj unuopulojn agadi laŭ ĝiaj konsiloj;
 2. Konforme al la tradicia humaneca internaciismo de la Esperanto-Movado, akceptas la proponon de prof. Ivo Lapenna apogi la Manifeston 77 de la Esperanto-Movado — por paco en libereco — por libereco en paco, kaj alvokas la Esperanto-organizaĵojn kaj unuopulojn kunsubskribi ĝin;
 3. Decidas apogi la agadon de Amnestio Internacia por la liberigo de la esperantisto Jurij Belov kontraŭleĝe tenata en mensa hospitalo en Krasnojarsk, Siberio, USSR; sendi tiucelan telegramon al prezidanto de la Prezidio de la Supera Soveto de USSR, L.I. Brejnev; inviti la Universalan Kongreson en Reykjavík kaj la kongreson de Sennacieca Asocio Tutmonda en Augsburg agi same.
- II. Pritraktinte la organizaĵajn demandojn de la Neŭtrala Esperanto-Movado, la Konferenco:
 1. Gratulas la redakcion de *Horizonto* pro ĝia celtrafa redaktado de la revuo laŭ la gvidlinioj de la 2-a Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado kaj konsilas al ĝi konservi la saman proporcion inter la informa kaj strikte kultura partoj de la periodaĵo;
 2. Laŭ la invito de la redaktoro de *Horizonto*, subtenata de la Esperanto-Societo «Frateco» en Zaragoza, decidas okazigi la 4-an Konferencon de la Neŭtrala Esperanto-Movado en la somera universitata urbo Jaca, se iel eble de la 22-a ĝis la 29-a de julio 1978.
- III. Post la preleg-serio pri «La lingva problemoj en la nuntempo kun aparta konsidero de la bezonoj de Eŭropo» kaj post detala prilumo de la diversaj aspektoj en ĝenerala kunveno, la Konferenco:
 1. Subtenas la klopodojn de la Eŭropa Klubo (Paderborn) kaj proponas al ĝi funkcii kiel centro de agado en Eŭropo favore al la Internacia Lingvo;
 2. Sugestas al la Eŭropa Klubo ellabori kiel eble plej baldaŭ kunordigan agad-programon laŭ la ideoj esprimitaj en la debato; starigi reton da kompetentaj kunlaborantoj en ĉiu eŭropa lando; kaj havigi la necesajn financajn rimedojn por la realigado de la programo.

Humlebæk, la 30-an de julio 1977.

H. V. Rasmussen
Prezidanto de la Konferenco

MANIFESTO 77 de la Esperanto-Movado POR PACO EN LIBERECO - POR LIBERECO EN PACO

1. *Gisnunaj apogoj.* — Novaj apogoj al la Manifesto daŭre alvenadas el ĉiuj partoj de la mondo. Kiel anoncote en la antaŭa komuniko (*Horizonto* n-ro 4/77, p. 92), kompleta listo estos farita nur en januaro 1978, ĉar la kolekto de subskriboj finiĝos la 31-an de decembro 1977. Por ioma orientiĝo jen la nomoj de nur kelkaj el la tre multaj pliaj personoj, kiuj kunsubskribis ĝis la 1-a de septembro 1977:

Svend O. Andersen, ĉefinstruisto; Prof. J. E. Bachrich, ĝenerala sekretario de Venezuela Esperanto-Asocio kaj del. de UEA; K. Barković; S. Barković; Günther Becker, Honora Prezidanto de TEJO, antaŭe ĝenerala sekretario de UEA; Roger Bernard, sekretario de la Akademio de Esperanto; D-ro Karl Beckmann, prezidanto de Aŭstria Esperantista Federacio, redaktoro de la Esperanto-Fako de Radio Vieno; André Bourdeaux; ĉefo de la departemento pri informado de la francaj fervojoj, antaŭe komitatano de UEA; Manuel Díaz Camacho, komercisto, del. de UEA; C. E. Carlsson, del. de UEA; Marcel Delcourt, fakdel. de UEA; P. Diksstein, verkisto; D-ro Roland England, Ph. D. de la universitato de Liverpool, universitata esploristo pri matematiko en la Nacia Universitato de Meksikio; R. Fiquet; Henry Friden, del. kaj fak. de UEA; Ing. Zrinko Grohovac, sekretario de Esperanto-societo «Bude Borjan» en Zagreb; Mogens Groth, arĥiva asistanto, estrarano de la dana sekcio de ILEI; Arma Haraste, del. de UEA; Giacinto Jacobitti; T. Gerrit Knol, dentkuracisto, del. kaj fakdel. de UEA; Prof. J. Kohen-Cedek, verkisto, vicprezidanto de Esperanto-Ligo Israelanda; Nada Kömiveš; Erik Lundvall, prezidanto de Esperanto-Klubo en Borlänge; J. S. Larsen, gimnaziano; P. Bo Larsen, dipl. ekonomiisto; Daniel Luez, licenciulo pri beletrio, Kavaliro de la Ordeno de Akademioj Palmoj; H. D. Maas, dipl. matematikisto, gvidanto de esplorgupo pri aŭtomata tradukado, Universitato de Saarbrücken; Bertil Magnellsson, inĝeniero, del. de UEA; Carmel Mallia, sanitara inspektoro, prezidanto de Malta Esperanto-Societo; Camille Martin, eksdelegito de UEA; Prof. D-ro Carlo Minnaja, universitata profesoro, ĝenerala direktoro de la Itala Esperanto-Instituto; H. Müller; Ing. Ortégón-Espinell Lope-Hugo, del. de UEA; A. Parker, laboratoria asistentino; Prof. D-ro Ing. Oton Pancer, universitata profesoro, prezidanto de Kroatia Esperanto-Ligo, komitatano de Jugoslavia Esperanto-Ligo; Antonio Pisa, publicisto; P. S. Platek; E. Ethel Solhaug, instruistino; Prof. D-ro Ilmar Tamello, profesoro de jurfilozofio en la Universitato de Salzburg; Marianne H. Vermaas, fizioterapiistino, antaŭe Direktorino de la C. O. de UEA, antaŭe multjara komitatanino de UEA, antaŭe administrantino de Instituto Hodler '68; Jeannine Vincent; Oliver Walz, prezidanto de Internacia Esperanto-Klubo, del. de UEA; Takajo Walz, japana juristino; C. Wijn; Albert Wickler, prezidanto de Luksemburga Esperanto-Asocio; Miro Zavodski.

El la kolektivaj pliaj apogoj la plej grava — fakte decide grava el vidpunkto de la tradicia esperantismo — estas tiu de la Tria Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado. En Nova Smirna okazis en aprilo aparta kunveno de la Greka Agadgrupo de NEM por pritrakti la Manifeston. La 34 partoprenintoj deklaris: «Ni kunvenis por firmigi per niaj subskriboj nian senrezervan aprobon al la Manifesto 77 de la Esperanto-Movado...». Menciindaj estas ankaŭ la kolektivaj apogoj, subskribitaj de 5 ĝis pli ol 80 personoj, inter kiuj tutaj grupoj en Alcañiz (Teruel), Callosa de Segura, Kronach, Manresa, Moehnesee, Solten, Zaragoza.

Pluraj subskribintoj aldonis interesajn komentojn. Jen nur du el ili, ambaŭ el Orienta Eŭropo:

«Humila servanto de justeco kaj paco», kiel la koncerna apoginto difinis sin mem, skribis interalie: «Mi opinias, ke la Manifesto 77 jetas pli da grajnoj inter homojn (ol kiu ajn lastatempa agado)... Ĝi povas fariĝi la fermentilo de libero, justo kaj paco en la mondo. ... Per ĝi ni solidariĝas kun aliaj sociaj movadoj en la batalo por la homaj rajtoj...».

Longjara aktivulo kaj nun sekretario de unu el la plej grandaj Esperanto-societoj, finis sian longan leteron jene:

«Ni partoprenis liberigan militon antaŭ pli ol 30 jaroj kredante, ke ĝi alportos inter humanismaj fruktoj ankaŭ la neŭtralan Internacian Lingvon, sed tio ankoraŭ ne okazis... Al tiuj, kiuj konscie subpremas veran humanismon, estas vane ion klarigadi, sed oni devas pro tiuj aliaj, kiuj ne vidas, ke nur neŭtrala Lingvo humanismon povas antaŭpuŝi veran internaciecon, fratecon, liberecon kaj pacon. Tial mi elkore vin salutas per POR PACO EN LIBERECO — POR LIBERECO EN PACO — POR NEŬTRALA LINGVO INTERNACIA.»

2. *Prisilento.* — Per apartaj akompanaj leteroj la Manifesto, kies enhavo estas absolute konforma al art. 4 de la Statuto de UEA, estis sendita kaj al la Estraro de UEA kaj al la LKK de la UK en Reykjavík kun propono, ke ĝi estu prezentita al la Kongreso por akcepto. Kiel atendite, ĝis la 1-a de septembro venis nenia reago. Laŭ la ricevo por akcepto, la propono apogi la Manifeston estis komunikita nek al la Komitato vitaj informoj, la propono apogi la Manifeston estis komunikita nek al la Komitato de UEA, nek al la Universala Kongreso, kies ĉeftemo estis — «La Rajto je Komunikado!» Kun tia «rajto komunikadi» en UEA sub la nuna gvidantaro, des pli grava fariĝas la tasko de ĉiu apoginto vaste diskonigi la enhavon de la Manifesto. Ĉiu Esperanto-organizaĵo aŭ unuopulo, laŭ kiu ajn maniero sciiginta pri la Manifesto kaj deziranta kunsubskribi ĝin, povas tion fari per simpla poŝtkarto adresita al la iniciatinto (77, Green Avenue, Wembley, Middlesex, HA9 8TF, Britio).

I. L.

Skizo pri kunlaboro kibernetike-pedagogia

Resumo de interparoloj okaze de la «Jornadas sobre Pedagogia Cibernética» en Cáceres (Hispanio), 1977—4—4/5

0. Instigo kaj formo de kunlaboro

- 0.1. Grandaj sistemoj de la filozofia pedagogio estas evoluigitaj de unuopaj geniuloj kune kun ties disĉiploj kaj epigonoj. La pedagogio kibernetika aliflanke nur povas evolui surbaze de kunlaboro de diversaj samnivelaj pedagogiistoj, ĉar ĝi ece konsistas el teoremoj, kies empiriajn kaj matematikajn pruvojn almenaŭ grandparte ellabori la mallonga laborvivo de unuopa sciencisto ne ebligus. (Certgrade BUR-BAKI estu modelo, sed sen la rezigno menciitaj individuajn meritojn.)
- 0.2. La kunlaboro scienca en la kampo de la kibernetika pedagogio ne devas kaj ne povas esti kunlaboro nur de samkulturanoj, ĉar la teoremoj de la kibernetika pedagogio ne dependas de valorigoj diversaj en diversaj kulturoj, kaj la nombro de fakuloj en neniu kulturo sufiĉas estonte por memstare pli-evoluigi kontentige la kibernetikan pedagogion. Se do necesas lingvolim-transpaŝa kunlaboro scienca, tio signifas nek la postulon subhufigi sub iu kulturo (nek germanlingva, nek angla-lingva, nek alilingva) nek la postulon rezigni pri la instigoj kaj faciligoj alportataj de la pensmedia gepatra lingvo — malgraŭ ties aliflanka stildetermina efiko. Lingvolim-transpaŝa kunlaborado de la kibernetikaj pedagogiistoj pro tio efektiviĝos per kritika reformulado, en science taŭga, neŭtrala lingvo, de rezultoj almenaŭ parte trovitaj per la heŭristikaj fortoj de opaj nacilingvoj.

1. Pliefektivo de la informfluo kaj de la dokumentado internaciaj

- 1.1. Ĉiu nova rezulto de la kibernetika pedagogio estu ankaŭ estonte publikigota unue en tiu lingvo, kiu estis la medio kaj ilo de ĝia mensa ellaboro. Sed resumo tuj estu publikigota en neŭtrala lingvo.
- 1.2. Necesas ke en ĉiu lingvo uzata por progresigi la kibernetikan pedagogion ekestu almenaŭ unu scienca revuo kiu kaj estas malfermita al koncernaj kontribuoj, kaj kunlaboras en la internacia resumaro «Homo kaj Informo» (fondita 1975 de la Instituto pri Kibernetiko, Berlino kaj Paderborno).
- 1.3. Dezirindas ke la kibernetikaj pedagogiistoj prefere publikigu iliajn novajn rezultojn en nacilingvaj fakrevuoj jam aliĝintaj al la komuna resumaro «Homo kaj Informo»; se necese, ili instigu taŭgan revuon aliĝi.

2. Evoluigo de unueca faklingvo

- 2.1. La uzado de diversaj fakvortoj samsignifaj en la sama lingvo reliefigantaj diversajn skolojn aŭ opajn fakulojn malhelpas la progreson (kaj disvastigan kaj enhavan) de la kibernetika pedagogio. Diversaj terminologioj — simile al diversaj koordinatsistemoj en analiza geometrio — kelkfoje praviĝas plifaciligante diversajn problemarojn; sed sen difinaj interligoj — similaj al transformigaj ekvacioj por koordinatsistemoj — unueca teorio ne eblas. Terminara laboro unue plifortiganta ĉi tiajn difinajn interligojn kaj iom post iom ankaŭ unueciganta en ĉiu nacilingvo la fakvortaron do dezirindas.
- 2.2. La unua ŝtupo de faklingva unuecigo estu la kreo de internacia fakvortaro kibernetike-pedagogia, enhavonta la ĉefajn fakvortojn en la neŭtrala lingvo uzota por lingvolim-transpaŝa kunlaboro, kaj iliajn nacilingvaj tradukojn. (Krei tian internacian faklingvon eblas sen damaĝi la nacilingvaj stildiversecojn de opaj skoloj aŭ fakuloj.)

3. Evoluigo de komuna kursplano

- 3.1. La opaj universitataj profesoroj kaj docentoj kiel fakuloj de la kibernetika pedagogio ĝis nun unualoke reliefigis la proprajn kontribuojn al tiu ĉi branĉo de la klerigscienco, kaj dualoke la kontribuojn de samlingvaj kolegoj aŭ de kolegoj publikigitaj en hazarde lernitaj fremdlingvoj. Tio ankaŭ estonte praviĝas en la kadro de kursoj por progresintoj. Sed la kibernetika pedagogio intertempe atingis inter-damentaj prelegoj kaj seminarioj celantaj komencantajn studentojn.
- 3.2. Komuna manlibro kolektu la plej gravajn ĝisnunajn rezultojn de la kibernetika pedagogio laŭ la jam ellaboritaj elektkriterioj. Tiuj rezultoj estu la enhavo de kibernetike-pedagogiaj universitataj kursoj porkomencantaj, kaj ankaŭ bazo de ellaborenda komuna internacia lernolibro de prospektiva, do (almenaŭ:) precipe kibernetika pedagogio.

3.3. La komuna internacia lernolibro estu skribita laŭ jam skizita enhavplano ĝis ĉirkaŭ 1980 en la neŭtrala lingvo de la internacia kunlaboro kibernetike-pedagogia kaj publikigita dulingve en la unuopaj lingvo-regionoj; kaj oni bindu en la lernolibron inter la *komunajn* foliojn kun la internacilingva teksto *kromajn* foliojn kun la respektiva traduko nacilingven.

3.4. Plibonigendaj partoj de la internacia lernolibro aperu dise jam antaŭ 1980. Kiel provizora teksto de la unua el tiuj partoj estu konsiderata la (ankoraŭ tradukenda) scienc-teoria parto «Nocio kaj programo de la kibernetika pedagogio» en la dulingva libro «Klerigo kaj Prikalkulado» (kompilita 1976 de H. Behrmann kaj S. Știmec).

4. Komuna evoluig-projekto

4.1. Por plifaciligi perkomputilan tekst-prilaboradon estu elektota kiel neŭtrala inter-taŭga inter la jam ekzistantaj planlingvoj, nome la Internacia Lingvo (Esperanto), mallonge: ILo.

4.2. Ĉiuj resumoj el «Homo kaj Informo», kiuj koncernas la kibernetikan pedagogion, estu enmemorigita en aŭtomatan dokumentad-sistemon perkomputilan.

4.3. Estas evoluigenda ILa sistemo por komunikado de sciencistoj kun komputilo por sciiĝi pri ilin koncernaj dokumentitaj sciaĵeroj.

4.4. Estos ligitaj kun la aŭtomata dokumentad- kaj komunikad-sistemo jam ekzistantaj kaj estonte evoluigendaj aŭtomataj tradukprogramoj el ILo en opajn nacilingvojn.

4.5. Estu evoluigota internacie uzebla komputil-asista instrusistemo pri kibernetika pedagogio surbaze de tekstoj el la internacia lernolibro.

5. Komuna esplor-projekto

5.1. Krom la valoraj kaj necesaj *disaj* esploroj de la opaj fakuloj diverslingvaj, ankaŭ *komunaj* esplorprojektoj dezirindas kaj surbaze de ILo plej facile eblas — precipe la pliprecizigenda «Eŭropa Kunlabor-Projekto Pedagogia, Interlingvistika kaj Kibernetika (EKPIK)», en kies kadro diversaj bazaj esploroj informpsikologiaj, lingvokibernetikaj, klerigteknologiaj kaj aliaj jam estas komencitaj.

5.2. Kiel bazo de komuna internacia esploro estas daŭrigendaj respektive realigendaj en diversaj lingvo-regionoj kursoj (libervolaj aŭ regulaj):

(a) por lingvo-orientigo (ekz-e laŭ la Paderborna Modelo) de infanoj 8- kaj 9-jaraj de la elementa lernejo, por eduki ilin al eŭropa resp. internacia pensmaniero kaj faciligi ilian eventualan postan lernadon de fremdaj nacilingvoj; science tiu kurso taŭgas i. a. por mezuri depende de la gepatra lingvo la inform-enhavon de ILo kiel instruajon, la lernprobablojn de opaj fremdaj vortoj depende de ties longeco, inform-enhavo aŭ aliaj trajtoj, la efikon de aŭdvidaj kaj aliaj instru-sistemoj, kaj la «transferon» (lernplifaciligon) al aliaj fremdlingvoj;

(b) de simila speco kun similaj celoj por infanoj de subnormalaj lernejoj; science tiu kurso taŭgas por esplori la dependecon de lingvo-kibernetikaj, informpsikologiaj kaj klerigteknologiaj variabloj de la inteligentec-kvocianto;

(c) planlingvaj (aŭ interlingvistikaj) por gelernantoj en aliaj lernejoj, precipe post almenaŭ 2-jara lernado de fremda nacilingvo; science tiuj kursoj taŭgas por esplori la aĝ-dependecon de diversaj lingvo-kibernetikaj, informpsikologiaj kaj klerigteknologiaj variabloj, kaj por mezuri la «transferon» de la jam komencita fremdlingva kurso al la lernfacileco de ILo.

(c) de simila speco, sed ankaŭ 3-tagaj rapidkursoj por studentoj kaj instruistoj, kiuj intencas instrui ILon en lernejoj resp. akiri nuran legkapablon en ILo; tiaj kursoj taŭgas science i. a. por elprovi kaj plibonigi kibernetike-pedagogie bazigitan metodon por uzi optimume la disponeblan tempon por ekzamen-preparo.

5.3. Ĉiuj kunlaborantoj kaj kunlaborontoj en EKPIK regule ricevos la EKPIK-Cirkulecon kiel informilon pri la stato de la projekto en diversaj landoj. Krome dezirindas, ke la kunlaborantoj laŭeble ofte partoprenu la laborkonferencojn de la sekcioj «Kibernetiko» kaj «Interlingvistiko kaj Lingvo-Kibernetiko» de la internacia «Societo pri Programita Instruado (GPI)» por raporti kaj diskuti en tiu kadro pri progresoj de la propraj kontribuoj al la komunaj esplorprojektoj kaj evoluig-projektoj.

"LA INGENIA HIDALGO DON QUIJOTE DE LA MANCHA" EN ESPERANTO

Jen, antaŭvidite, malfacilega tasko: recenzi inde pri la traduko eventa kaj epokfara, kiun akademiano Fernando de Diego kulminis, el la glorega verko de Miguel de Cervantes Saavedra «Don Quijote», kiu, sendube, estas la plej fama romano ĉiutempa kaj ĉiulanda. Ŝajnas al mi, ke la plej grava kaj karakteriza libro de la tiel nomata «Ora jarcento» de la hispana literaturo, alprenas nun, en la freŝaj esperantlingvaj paĝoj, novan perspektivon de universaleco — laŭ esperantisma prismo —, pro la evidenta fakto, ke la tradukinto kapablis prilaboradi kun profunda beletra kaj fakula kono de la originalo; kun perfekta ĝisanimi sciado de la zamenhofa ilo, kaj kun profunda priatentado je la esperantista popolo, kiu ne meritas iun ajn surogatan version nematuran, aŭ simplan, bonintencan mistifikadon.

F. de Diego sentis sin kun la necesa forto plenumi tiun kolosan entreprenon, kaj ĉiu esperantisto scias, ke li estas, nun, la unusola persono kapabla inde enskribi la senmortan verkon de Cervantes en la oran bibliografion de nia kara kaj esprimiva lingvo. La du ĉapitroj de lia traduko, kiuj specimene aperis antaŭe en «Horizonto», vekis en ĉiu la nepran deziron gustumi la tutan monumentan verkon.

Ne hazarde «Don Quijote» estas unu el la plej tradukitaj kaj, sekve, diskonigitaj kaj trastuditaj libroj. Ĝi rangas, i.a., apud la «Dia Komedio» kaj la plej elstaraj teatraĵoj de Shakespeare; ĝi atingis ĉirkaŭ mil eldonojn; ĝi ĉiam estas aktuala pro sia multflanka aspekto de geniaĵo, ne pro ia ŝablona klasikeco. La ĉapitroj, kiuj rakontas la plej diversajn epizodojn aŭ aventurojn de tiu duonfreneza altmorala viro de La Mancha, fariĝis de antaŭ tri-cent jaroj diafana spegulo de homaj reagoj enregistriĝantaj, precipe, en la jam neŝanĝeblan historion de Hispanujo. Kaj ili trovas en la nuntempo samvaloran ekvivalenton.

Ne estas eble redoni al traduko de majstra klasikajo la lingvaj kaj dialektajn subtilaĵojn de la originalo, sed estas tute eble krei en Esperanto la lingvistikan etoson por konvene situigi la legantaron en la kapablon percepti la kernajn, ĝeneralajn kaj konstantajn stilajn trajtojn de la rakontada celo.

F. de Diego, kiu jam multfoje, kaj ĉiam sukcese, ensekretigis nin en tiun rezulton de perfekta ellaborado, kulminigis sian novan virtuozan aferon, kaj artisme implikis kaj malimplikis la varpon kaj la vefon de tiu universala romano, ĉiam laŭ teksaĵo mirinda, ĉiam plenefike! Li saĝe uzis neologismojn (aŭ li ilin kreis) kiam la senco teksta, aŭ simple nuancvorta, nepre postulis nedubigan elvokivecon. Jam legante la «Prefaco», oni tuj konscias pri la bonega traduklaboro de la tuta verkego, kaj des pli bone se oni metas antaŭ si la originalon. Ĉio prenas ordon kaj ekvilibron, fluecon kaj ĝustan mezuron de vortoj, kiuj esprimiĝas trans la gramatikaj leĝoj aŭ la konvenciaj vortbildoj de idiomato sub blovado de evoluo konstanta kaj de senco-ŝanĝiĝo. (Mi parolas pri la kastilia lingvo, kiu neniam restis stagna).

La idiotismoj, la popolaj diraĵoj, la parolturnoj, trovas siajn respektivajn esprimojn, laŭ plej supla kreopovo lingva. Ĉiu el la pluraj poeziaĵoj, kiuj jam de komence spicas la verkon, en la «Prefaco», posedas grandan satiran kaj celtrafan intencon. Jen malgranda, sed, ja, varia specimeno de la tuta romano. La tradukinto enprofundiĝis konscie en ĉiun apartan cirkonstancon, kaj tiel la laboro atingas gradon de rekreado majstra, sed ne, supozeble, de senpersonigado pri la aŭtoro. Ĉiu paragrafo, ĉiu alineo, ĉiu esprimo altatona, invitas la komparon kun la originalo por nia absoluta ĝuo kaj daŭra kontento. Ni troviĝas plene kaj en la tempo kaj en la spaco tiuepokaj.

Cervantes verkis, ne nur por distro, sed precipe por bildigi akvaforte la socion kaj la personojn, kiuj superregis sendefendajn sociajn tavolojn. Ili tion faris per trouzado de sia aŭtoritato, ofte senmerita, sanktigita vole-nevole de nobelaj atributoj arbitraj aŭ nur de la monpovo. Tial la «Migranta Kavaliro» fariĝas lumo kaj spegulo, kaj ankaŭ la plej virta (ĉasta) kaj kuraĝa kavaliro, ĉar li tute nature praktikis propran filozofion de popola saĝo. La satiro evidentiĝas laŭlonge de la du densaj partoj, kiel senegala leciono deprenita de spontanea humanismo. Ĉiu ĉapitro fariĝas barokstile retablo de la vivo enlanda, kiu tiam ŝajnis esti neŝanĝebla kaj fidela al mizero korpa kaj spirita: al heredaĵo de obstina obskurantismo, kaj tributado al sortoelektitaj personoj.

Parodiante la stilon kaj faroin de la kavalireca vivo, Cervantes trafis la rimedojn por denunci kaj primoki, laŭdi, priskribi kaj ironiadi la tiutempan vivon, laŭkonvene. Don Quijote reprezentas idealismon; Sancho, la praktikan agadmanieron: jen ia platonismo kaj la vivmaniero de pigra friponaro, laŭ la du respektivaj flankoj. Cervantes — la tiel nomata Princo de la Ingeniuloj — evidentiĝis superega majstro. Do, tradukisto lia devas disvolvi brile, digne, malfacilegan taskon, por tiel redoni des pli multe la riĉecon de senkompara sprita rakontado: ke la absoluta oro ne fariĝu straso.

F. de Diego response priatentis tion kaj proponas al ni tiun fajnman trezoron kiu sediĝas en la fandujo de la lingvo, Esperanto, tradicie montriĝanta tre taŭga por tiuj noblaj kaj riskaj aferoj. Pravigas tion «Sinjoro Tadeo», «La Faraono», «La Sankta Biblio», «Quo Vadis?», «La Dia Komedio», «Martín Fierro», «Somermeznokta Sonĝo»... (La nomojn de la respektivaj tradukintoj ni dankeme kaj admire gardas en la koro). F. de

Diego estas unu el ili, kiu glorigas Esperanton kaj kontestas tiujn, kiuj obstine kaj antaŭjuĝe neas la senfinan kapablon artan de la Internacia Lingvo.

Ho, tiu «saĝa» kaj nobla frenezeco de Don Quijote aliformiganta barbiran pelvon en helmon, ventmuelilojn en gigantojn, vilaĝanajn verdikte la librobretojn de Don Quijote kamparaninojn en damojn, gastejojn en kastelojn, ŝafgregojn en malamikajn armeojn, vinfelsakojn en fiajn ulegojn! Sed, ĉio estis bonintenca. Ĉu ni ne transformas, iom senkiel agis la «Kavaliro de la trista mieno», ĉar li nur ricevis disbatojn.

La libro ankaŭ bildigas la gravajn literaturajn debatojn tiuepokajn, kaj ĝi starigas la finon de tia kavalirecmanio, kiu kreis ĝenron preskaŭ pseŭdoliteraturan. En la sesa ĉapitro de la Unua Parto, Cervantes traserĉas verdikte la cerbon de Alonso Quijano. Sed li savis indulge malmultajn librojn, kiuj ricevis pro tio plej eterna laŭdon.

Ĉiu leganto povas konstati per si mem, tre baldaŭ, ke la idealismo kaj la pragmatismo de la du ĉefroluloj ne estas nure simbolaj, sed ke tiuj karakteraj ecoj enkarnigas verajn homojn el karno kaj ostoj, vid-al-vide al ilia mondo — kun nia mondo plentajna je problemoj kaj postuloj. Cervantes, same kiel Shakespeare, ne stangas abstraktajn tezojn, sed konkretan realaĵon de homoj materiaj — pasiaj kaj emaj al multnombraj tentoj permesi sin kondukti laŭ la plej krudaj instinktoj.

La lingvaĵo de F. de Diego celas interpreti konkrete, sed malavare per vortoj plej ĝustaj, la klasikan lingvaĵon, kiu estas modelo plej supera de la kastilia idiomo. La sintakso de la tradukinto atingas ĉiam la plej trafan vojon, neperfide. Jen ekzemplo deprenita de la XI ĉapitro (1-a Parto):

«—Mi tre dankas —respondis Sancho— sed mi devas konfesi al via moŝto, ke, se mi havus abundan manĝon, mi plezure ĝin konsumus, tiel stare kaj solece, kiel side kaj apud imperiestro. Kaj, se diri la veron, nuraj pano kaj cepoj pli bongustas al mi en mia angulo, sen zorgoj pri ĉetablaj etiketoj kaj ceremonioj, ol la meleagro de aliaj lokoj, kie mi devus lante maĉi, ŝpare trinki, ofte viŝi al mi la buŝon, ne terni nek tusi, se mi tion dezirus, nek fari ĉion ceteran permesatan de la soleco kaj la libero. Tiel do mia sinjoro, bonvolu anstataŭigi per alio pli profitodona kaj konvena al mi la honoron, kiun via moŝto volas fari al mi asertante, ke, en mia ŝildista funkcio, mi estas membro de la vaganta kavalirismo. Mi tre dankas la honoron sed rezignas ĝin de nun ĝis la finiĝo de la mondo.»

Kaj en la sama ĉapitro oni povas legi plezurege la faman paroladon fare de Don Quijote «Feliĉa la epoko kaj feliĉaj la tempoj kiujn nomis oraj la antikvuloj...» plenŝtopita je la mirinda originala retoriko. Ĉar traduki ne egalvaloras al aplikado de matematika regulo, oni ne povas paroli pri absolutaj valoroj, ĉar ĉiu frazo nur prenas absolutecon laŭ la karakteriza sigelo de la tradukaŭtoro. Tio estas sufiĉa motivo por ke ni duoble ĝuu aŭ sentu veran kreskantan intereson.

Kaj, kion diri pri la longega poemo troviĝanta en la XIV-a ĉapitro de la 1-a parto, «Kanzono de Krisóstomo»? Tial, la tuta verko fluas agrable kaj sen ĝenaj implikajoj: la romano fariĝas plene atingebla, kaj nenio restas flankenlasita. Laŭdirinde estas ke, post ĉiu ĉapitro, apartaj glosoj aŭ komentoj komprenigas pli bone la tekston kaj sendubigas la leganton. Jen, do, traduko kiu restos porĉiame evento glora, monumenta. Ĉiu konscia esperantisto devas posedi por sia lego-ĝuo kaj kiel omaĝo al la Internacia Lingvo tiun sopiratan verkon.

Verŝajne ne ĉiu solidariĝos aprobe al ĉiuj lingvaj rimedoj, gramatikaj formoj aŭ konkretaj interpretoj. Por ekzemplo: pri la preskaŭ absoluta uzado de la prepozicio «sen» antaŭ infinitivo, kaj pri la ĝenerala anstataŭado de la determina adjektivo «tiu(j) ĉi» per la resuma «ĉi», eble iuj fundamentaj puritanoj plendos. Mi ankaŭ notas la formon «ale al»...

Pri tio nur la fakuloj devas paroli, sed ne mi en tiu recenzo, kiu ne antaŭcelis nur laŭdojn nek flaton, kvankam mi nur laŭdan inkon verŝis.

Gabriel Mora i Arana

LA INGENIA HIDALGO DON QUIJOTE DE LA MANCHA, aperis en eldono «Fundación Esperanto» de Hispana Esperanto-Federacio (Eldona Fakto) Zaragoza. 820 paĝoj, formato 17,5 × 25 cm, ilustrita, bindita. Prezo: 2.000 pesetoj plus 10 % por sendokostoj. Havebla ĉe F.E. Sekr. Inés Gastón, P.º Marina Moreno, 35, 4.º dcha. Zaragoza-1. Hispanio, aŭ ĉe via libroservo.

Dum dudek jaroj grize baraktinte
 en pluraj retoj de formala studo,
 mi fine nun akiris rekompencojn:
 esti magistro (se ne majstro) kaj
 la rajton verki, cele doktoriĝon,
 ĉi lastan tezon kontraŭ mia koro —
 el ĉia forŝiminta penskonipoŝto
 de cerboj kiuj doktis pedantece
 dum la jarmiloj.

Sed la sun forkuras.
 Jen ili, preter kurtaj lum kaj sombroj,
 jam eteriĝis, en Atika grundo,
 apud la abatejoj — kie foje
 asketa mor ĉagrenis sian karnon —
 kaj plu disloke nuligitaj ie,
 ekster bezon por larmoj aŭ cerbumo
 krom al moroza esploristo, kiu
 postfrotas inter polvo kaj pensoj.

Finfine restas super ĉiu gravo
 fridventa pluvo kontraŭ la vitraloj,
 subita neĝtavolo drapiranta
 la distancojn trans limojn kaj silenton
 kaj foje lanta fum, nebulo vasta
 laŭ valdeklivoj, kiu implikiĝas
 kun stipoj kaj ŝtonaro kaj memoroj —
 mistero del ekzisto konsumonta
 fabrikjarcenton kun la katedraloj.

Sed primaver denove la unua
 plenverŝas tagojn per parfummakuloj,
 vojflanke, de la mondsenfinaj floroj
 kaj noktojn grilĉirpantajn per stelaro
 aŭ plusorĉiva luno, kiu ĉiam,
 forerodite, poste reintegras.
 En smerklar golfeto flamas blue,
 kun sala fumo kie Sapfo iam
 revis sur la antikva plaĝo, nova
 per ĉiu ondo, laŭ ciruse ĉarma
 sezoninuit al homoj kaj hirundoj.
 Trans monton drivas hajloblanka nubo,
 kaj en la nokto aŭ foliombretoj
 de posttagmez dormema, akvo flustras
 profunde — apud la abeltaĉmentoj,
 kiuj zumante kaptas la okazon,
 aŭ kamparana voĉ, momente laŭta
 sub la finknesta bordsalik — laŭ vojo
 nespurebla trans jaroj kaj memoro...

17.8.1977
 Edwin de Kock

MIA SONGŬO

Jam dum nokto
mi songis sen fin'
pri la plej bela,
amata knabin'.

Pro tiu knabino
doloras mia kor'.
Si min forlasis
kaj restis for.

Nun la knabino
ĉe mia lit'
min kisas, karesas,
sen intermit'.

Si diras: — amato,
nur vin amas mi.
Por ĉiam, por ĉiam
mi revenos al vi.

—

Jam mateniĝas.
Krevas la kor'.
La belulino
Ankoraŭ estas for.

Belaj estas la songoj,
dolĉa — la sent'.
Io ploras interne.
Ho, kia turment'!

Larmoj, ho, larmoj
fluas abunde.
La vivo — amara.
Sangas la vundo.

Kruela estonto
restas por mi.
Ĉu helpas mia ploro?
Ĉu helpas mia kri'?

Velkas la juneco
kiel arba foli'.
Etingiĝas la songo
pri espero de mi.

Lasas la jaroj
kun fulma rapidec'.
Neniam plu revenos
la kara junec'.

DORMETAS LA URBETO

Dormetas la urbeto.
La fenestroj — fermitaj.
En malluma nokto
al mi venu, amato.
Sur monto, en ĉambreto,
loĝas mi sola.
Estas tie kviete,
estas tie bele.

La ĉambreto estas kviete.
La ĉambreto — bela.
Flustras nur rivereto,
zumadas nur grilo.
Kreskas ĉirkaŭe
arbetoj kaj floroj.
Al mi venu, amato,
en malluma horo.

Prenu la gitaron
kaj venu al mi.
Kortuŝan kanton
ludu por mi.
Ludu pri knabino
juna kaj bela.
Si havas amaton
kaj tamen estas sola.

Ankaŭ mi estas sola,
sola kiel ŝtono.
Mi havas amaton
kaj estas sola en mia domo.
Prenu la gitaron
kaj venu al mi.
Ludu senĉese
la kanton por mi.

IAM MI PROMENIS

Iam mi promenis.
Junulo jen alvenis.

Min ami li promesis.
Min ami li ne ĉesos.

Komencos li somere
en maja vespero.

Pasis jaro kaj duono.
Ne venis la fripono.

El juda tradukis
Ben Alter Jehiel

POSTTAGMEZO

EN

EL PRADO

Unu el miaj plej agrablaj travivaĵoj eksterlande estis la jaro, kiun mi pasigis en Hispanujo kolektante materialon por mia doktoriĝa disertacio pri la historio de la 17-a jarcento. Mi havis komfortan loĝejon en la centro de Madrido kaj mi rapide amikiĝis kun la ĉirkaŭaĵo kaj la popolo. Dumsemajne mi laboris en bibliotekoj kaj arkivoj, ĉeestis universitatajn prelegojn kaj pritraktis diversajn temojn kun miaj hispanaj kolegoj en kafejoj longe post noktomezo. La semajnfinojn mi dediĉis al ekskursoj ekster la ĉefurbo por viziti historiajn kaj artajn monumentojn en aliaj urboj. Sed ĉiam, kiam prezentigis la okazo, mi volonte akceptis la afablan inviton de Prof. Ramón Cifuentes y Aguirre akompani lin al unu el la urbaj muzeoj.

Don Ramón, kiel ni familiare nomis lin en nia rondo, estis instruisto en la altlernejo pri belartoj kaj havis enciklopediecan fakscion pri la arto de Hispanujo. Li ofte klarigis al mi multajn aferojn, kiujn mi ne trovis pritraktitaj en la historiaj verkoj, kiujn mi funde esploris, sed li ne ĉiam informis min pri siaj fontoj. Kvankam mi fidis lin kaj danke ricevis la informojn, tamen mi ne kuraĝis uzi tiujn donitaĵojn en mia tezo sen povi citi skribajn dokumentojn. Iun tagon li malkovris al mi sian sekreton.

Ni iris al la renoma madrida artmuzeo, *El Prado*, kaj prenante min ĉe la brako, Don Ramón kondukis min en la ĉambron, kie troviĝas la plej fama pentraĵo de Velázquez, *Las Meninas* — «La Ĉambelanoj».

«Nu», li demandis, fingromontrante al la figuroj, «ĉu vi scias, pri kio ili babilas, la infantino Margarita en la antaŭo, ŝiaj du ĉambelanoj apude, la nanoj Mari Bárbola kaj Nicolás kaj nia amiko Diego, kiu metis ankaŭ sin en la scenon?».

Tiu stranga demando iom surprizis min, precipe ĉar Don Ramón traktis tiujn homojn tiel senceremonie, kvazaŭ li persone konus ilin.



«Ne, mi ne havas eĉ ideeton. Mi legis, ke oni scias la nomojn de ĉiuj homoj figuritaj en la bildo, sed kiel estas eble scii la temon de ilia konversacio? Se mi devus konjekti, mi dirus, ke la pentristo rakontis fabelojn al la reĝidino, por ke ŝi restu kvieta dum la pentrado.»

«Jes ja», ridetante respondis Don Ramón. «Oni bone konas la rolantojn, kaj unu-du arthistoriistoj riskis diveni, kial la granda majstro faris tiun pentraĵon. Eĉ infano povas trovi la reĝon kaj reĝinon en la spegulo sur la muro en la fono. Sed mia demando temas pri la kaŝita intima enhavo de la verko. Ne la pentraĵo sed la pentrado. Alimaniere dirite, la agado, ne la rezulto. Ĉu mi klare esprimas min?»

«Ne tute, Don Ramón», mi diris, skuante mian kapon. Kelkfoje la enigma parolmaniero de la artprofesoro malfaciligis interkomprenon. «Kiel oni povas rehavigi al si eventojn el la pasinteco, eĉ se ili estas bildigitaj en ĉefverko, kia estas tia antaŭ ni?»

«Estu pacienca. Mi tuj montros tion al vi.» Li elpoŝigis malgrandan nigran skatolon same grandan kiel 35-milimetran fotografilon. Ankaŭ ĝi havis aperturon kun

lenso, sed ĝi similis pli al radioaparato, ĉar ĉe unu flanko estis enŝovebla anteno kaj sur la dorso ciferplato, diverskoloraj butonoj, ŝaltiloj kaj klavoj.

«Baldaŭ ni aŭdos la interparoladon, kiu estiĝis dum Velázquez surtoligis unu el la momentaj okazaĵoj, kiujn li ĉiutage travivis en sia ateliero en la reĝa palaco.»

Mi devas konfesi, ke la konduto de Don Ramón perpleksigis min. Mi ja scias, ke se oni longe kaj atente studas artverkon, informigante pri la temo, profundigante en la historio de la periodo kaj krome, konatigante kun la vivo kaj pensoj de la artisto, oni povas vidi multe pli en la verko kaj tiusence kompreni ĝin, eĉ ekscii, kion la kreinto volis komuniki kaj esprimi. Laŭ mia opinio, nur tiel artverko povas «paroli» al spektanto. Sed aŭdi voĉojn de dudimensiaj formoj sur kolorigita tolo — tute neeble!

Don Ramón jam ŝaltis la aparaton kaj eltirante la antenon, li direktis la lensaperturon al la pentraĵo. Poste li premis kelkajn butonojn kaj ŝovis la ciferdiskon tien kaj reen, ĝis la nadlo sub la luketo ĉesis oscili.

«Don Ramón, mi timas, ke ĉi-foje vi blagas. Kiel je la nomo de la diablo estas ĉeble...»

Interrompis miajn vortojn sonoj venantaj el la skatolo en la mano de Don Ramón. Post plua manipulado de la butonoj, homaj voĉoj estis klare aŭdeblaj. Subite mi ridis.

«Ha! Kial mi ne pensis pri tio. Nun mi komprenas ĉion. Mi scias, kion vi havas. Ĝi estas unu el tiuj novaj porteblaj radio-riceviloj, kiujn muzeoj nuntempe provizas al vizitantoj, por ke ili povu aŭskulti klarigojn pri la objektoj kaj ekspozicioj en la muzeo. Oni luas ĝin, kiam oni eniras en la muzeon kaj oni povas aŭdi prelegeton en ĉiu salono. Eĉ eblas ricevi versiojn en fremdaj lingvoj.»

Don Ramón gravmiene kapneis. «Jes, mi konas tiuspecan radioaparaton, sed tiu ĉi ne estas unu el tiuj primitivaj instrumentoj. Mia inventaĵo ebligas la kaptadon ne de nuntempe elsenditaj programoj, sed de «programoj» de la pasinteco, ekzemple, de la tempo, kiam tiu ĉi pentraĵo estis farita.»

Nun mi fariĝis scivola. «Kiel povas okazi tio? Kiuj leĝoj de la fiziko permesas al vi transsalti la tempan dimension?»

Profesoro Cifuentes malŝaltis la aparaton por ekspliki al mi siajn teoriojn pri la interpretado de artverkoj, kvazaŭ mi estus unu el liaj studentoj en la altlernejo.

«Vi komprenas, ke granda artaĵo, eĉ se ĝi estas tre antikva — pensu nur pri la prahistoriaj rokpentraĵoj en la groto de Altamira — povas paroli al spektantoj de postaj epokoj. La estetikaj elementoj, kiujn la artisto per vibranta energio fizika kaj spirita enmetis en la verkon, kapablas produkti similajn reagojn, sentojn, emociojn — mallonge dirite, vibrigi senteman observanton — kaj tiel trans-

doniĝas parto de la mesaĝo de la kreinto kune kun la tiutempa etoso de la verko.»

«Nu, jes, mi komprenas. Vi aludas la proporciojn, la interharmonion de la kolo-roj, la komponadon — ĉiujn formalajn elementojn, ĉu ne?»

«Kaj ankaŭ la enhavon de la pentraĵo», tuj aldonis Don Ramón kaj li ripetis sian aserton: «Ciu artverko havas kaj suprajn aŭ eksteran enhavon kaj kaŝitan aŭ internan enhavon.»

Tiumomente alproksimiĝis unu el la salongardistoj por atentigi nin, ke nia vigla diskutado fariĝis iom tro laŭta kaj komencis ĝeni aliajn vizitantojn.

«Nu», flustre daŭrigis Don Ramón, «per diligenta studado oni povas kompreni grandan parton de la enhavo de artverko, sed ĉiam kaŝas sin de ni plej esencaj informoj. La arthistoriistoj ofte mencias tiujn mankojn kun rezignacio. Mia opinio, oni povas scii ilin nur konversaciantes kun la artisto mem aŭ kun la homoj, kiujn li figuris». Fingromontrante al la pentraĵo antaŭ ni, li daŭrigis. «Precipe vi, kiel historiisto kun speciala intereso pri la 17-a jarcento devas konatiĝi kun la rolantoj en tiu sceno, en kiu aperas Velázquez mem, kiu estis ne nur la oficiala reĝa pentristo, sed ankaŭ ĉambelano. Li certe rakontos al vi pri multaj gravaj eventoj dum la regado de Felipe la IV-a, eventoj neniam registritaj sur la flavigintaj polvokovritaj paperaĉoj, kiujn vi trafolumas en niaj arkivoj.»

«Sed kiel eblas interparoli kun homoj, kiuj mortis antaŭ tri jarcentoj», mi demandis kun skeptika tono. «Ĉu per spiritismo?»

«Ne, per tiu ĉi aparato.» Forprenante la kovrilon, por ke mi povu vidi la internajn, li klarigis jene. «Ĝi estas tre kompleksa kaj sentiva elektronika amplifilo. Mia filo, kiu estas inĝeniero, faris ĝin laŭ miaj instrukcioj. Ĝi kapablas rehavigi al la spektanto aliajn dimensiojn de la artverko. Vi menciis kolorojn, proporciojn — ĝi kaptas ankaŭ sonojn, odorojn, la voĉojn de la pentristo kaj liaj modeloj, la tutan ĉirkaŭmedian fonon...»

Mi rigardis la vizaĝon de Don Ramón por ekvidi, ĉu estis sur ĝi tiu malica rideto, kiu karakterizas lian mienon, kiam li volas ŝercitrompi aŭ mistifiki iun, sed li aspektis tute serioze.

«Sufiĉas la klarigoj», mi diris senpacience. «Mi kredas ĉion, kion vi diras. Funkciigu la aparaton denove, por ke mi povu subaŭskulti la babiladon de Margarita kun ŝiaj ĉambelanoj.»

Fingrumante la butonojn kaj diskante la ciferplaton, Don Ramón denove direktis la oblongan skatolon al la pentraĵo, aldonante pluajn sciigojn. «Kiam antaŭ du jaroj ni eksperimentis per la unuaj modeloj, ni povis aŭdi nur la klakadon de la teksmaŝino, kiu faris la tolon, aŭ la marteladon de la artisto, kiam li fiksis ĝin sur la lignan kradon. Kompreneble, homaj voĉoj dronis en tiu bruego. Sed post pro-



funda analizo de la ondolongoj de pigmentoj, la sorbindicoj de oleoj kaj la reflek-kaj refrak-proprecoj de vernisoj, ni sukcesis modifi nian aparaton por elimini la ĝenajn fonbruojn kaj ricevi nur la sonojn rilatantajn al la pentrado mem.» Subite la vizaĝo de Don Ramón radiis, kaj li enmanigis la skatolon al mi.

Mi ne povis kredi, kion mi aŭdis. Diversajn voĉojn... jen viran... jen virinan... jen knabinan. Ĉiuj parolis samtempe. Poste mi aŭdis viran voĉon ordoni, ke ĉiu denove prenu sian pozicion; finiĝis la paŭzo kaj nun necesas daŭrigi la pentradon. Tute certe tiu estis Velázquez mem, mi pensis, kaj — ĉu estis mia imago, ĉu estis iu ŝanĝiĝo de la lumigado en la salono — mi ja vidis la majstron trempis sian penikon en la farboj sur la paletro. Hundo bojis. Mi ekrigardis la dekstran angulon de la bildo, kie tiu nazmakulo Nicolasito piedbatis la kuŝantan hundon. Ĉirkaŭ la aparato en mia mano ŝvebis odoroj de olefarboj kaj terebinto.

«Ĉu vi nun kredas, ke artverko vere povas paroli?» demandis Don Ramón, ridetante kaj karesante sian blankan pintbarbon.

Mirfrapite mi preskaŭ ne povis eligi vortojn por respondi. «Jes, via inventaĵo superas eĉ la televidon. Per ĝi oni povas akiri donitaĵojn, kiuj riĉigos la arthistorion de ĉiu epoko. Eblos ankaŭ aŭtentigi kun absoluta certeco ĉiun dubindan verkon. La falsistoj fariĝos senlaboraj!»

«Jes, mi jam komencis fari notojn pri la plej signifplenaj detaloj, kiuj estas sciendaj pri la hispanaj pentraĵoj en niaj muzeoj. Temas ĉefe pri tiuj aferoj, kiuj prezentas enigmojn al la kleruloj. Mi ankoraŭ ne okupiĝis pri eksterlandaj artverkoj pro lingvaj malfacilaĵoj, kvankam mi provis mian aparaton ĉe kelkaj francaj bildoj kaj kaptis sukplenaĵojn konversaciojn inter pentristoj kaj pozistinoj.» Kun satirusa mieno li komencis ridkluki, sed ĉesis kaj abrupte demandis, «Kioma horo estas?»

«La dua kaj duono.»

«Ho ve, mi promesis al mia edzino, ke mi venos hejmen ĝustatempe hodiaŭ por tagmanĝi. Mi devas rapidi. Jen, prenu la aparaton. Mi pruntedonas ĝin al vi. Vi povos reporti ĝin al mia oficejo lundon.» Doninte kelkajn rapidajn klarigojn pri la funkciado de sia inventaĵo, Don Ramón kure eliris, sed post momento lia kalva kapo reaperis en la pordaperturo.

«Mi forgesis montri al vi la verdan klavon. Se vi premas ĝin kaj parolas apud la dorsflanka kradajo, vi povos komuniki kun la personoj en la pentraĵo. Sed atentu! Elparolu klare kaj malrapide, ĉar eble ili ne facile komprenos vian fremdan prononcon de la hispana lingvo.» Kaj Don Ramón pafis sin for.

Stoniĝinte pro surprizo, mi staris eble tutan minuton en la mezo de la salono, timante tuŝi la miraklan aparaton en mia mano, tiun sloŝilon, kiu povas malfermi tutan novan mondon al mi. Sed kie komenci?

Amaso da vizitantoj nun ariĝis antaŭ la verkoj de Velázquez, do mi decidis serĉi pli trankvilan lokon. Dum mi pasis tra apudaj salonoj, kaptis mian atenton la du famaj pentraĵoj de Goya, *La Maja Vestida* kaj *La Maja Desnuda*. Jen bona loko provi la aparaton. Mi sciis, ke arthistoriistoj longe debatis pri la identeco de la virino, kiu pozis por Goya, jen kuŝante sur divano kaj surportante blankan diafanan pijam-similan harem-vestaĵon, jen etendante sin tute nude, eĉ sen pantofloj sur la piedoj. Laŭ la titoloj de la bildoj, temas pri tipo de hispana kamparanino, sed skandalfrandemuloj cirkuligis la legendon, ke tiu modelo estis neniu alia ol la Dukino de Alba, tiu alte kulturita monduma damo, kiu multe helpis la pentriston. Mi estis ege scivola, ĉu la Dukino vere estis figurita en tiuj du bildoj, kaj ĉu ŝia edzo sciis pri la seancoj, kiam ŝi pozis en kaj sen negliĝo. Kaj kian rilaton ŝi havis kun Goya? Ĉu nur tiun de patronanto kaj patronato? Espereble la malgranda skatolo de Don Ramón povos malfermi por mi la pordon de la ĉambro.

en kiu Goya pentris la du verkojn.

Mi alpaŝis antaŭ la pentraĵo de la vestita virino kaj preminte la ekirigan ŝaltilon, mi agordis la aparaton. Baldaŭ ĉirkaŭis min la varmaj kaj parfumitaj odoroj de buduaro. Klare aŭdigis virina voĉo, akrasona kaj laŭta. Ŝi babilis diverse kaj sinsekve pri ĉiutagaĵoj, pri kio ŝi faris kaj kie ŝi estis la antaŭan tagon. Sufiĉis. Mi turnis min al la paraĵo de tiu bildo — la nudulino. Ankaŭ ŝi laŭte parolis, preskaŭ kriis, ploris. Ho! Nun mi komprenis la kialon de la orelfendaj voĉtonoj. Kiam Goya pentris tiujn bildojn, li jam de pluraj jaroj estis surda. Mi serĉis iun manieron moderigi la laŭtecon. Bedaŭrinde, Don Ramón forgesis klarigi tion al mi. Nek la butonoj nek la ciferplato efikis tiucele.

Kelkaj apudstarantaj vizitantoj grimace kaj minace rigardis min. Tuj venis en mian kapon maniero silentigi la freneze babilantan virinon. Mi premis la verdan klavon, kiu funkciigis la sendilan parton de la aparato, por diri al la virino, ke ŝi parolu pli mallaŭte. En tiu momento mi sentis, ke iu ekstaris apud mi, kaj rigar-

dante okulangule, mi rimarkis unu el la salongardistoj.

«Señor, bonvolu esti tiel afabla kaj malŝalti vian transistoron.» Li alparolis min seke kaj senemocie, sed tre gentile. «Mi dezirus informi vin, ke laŭ la regularo de la muzeo, estas malpermesite fari bruon en la salonoj.» Poste, ŝanĝante sian voĉtonon, li aldonis: «Rigardu la aliajn vizitantojn, kiel ili silente ekzamenas ilin. Nur tiel estas eble kompreni la signifon de tiuj ĉi ĉefverkoj. KREDU min, señor, dum tridek jaroj mi laboras tie ĉi en *El Prado* kaj mi ja scias».

La eĥoj de la sinceraj vortoj de la gardisto superbruis eĉ la tranĉan voĉon en la nigra skatolo. Mi turnis mian vizaĝon al la bildo de la nuda virino, kaj fiksante miajn okulojn sur la voluptajn konturojn de la kuŝanta korpo radiantan varmajn nuancojn de mola karno, per malrapida fingromovo mi klake malŝaltis la aparaton.

Januaro 1977.

Bernard Golden

AMUZA LEGADO DE TIL' STRIGOSPEGUL'

LA DUDEK-KVINA HISTORIO diras, kiel oni malpermesis la dukan landon Lunjeburgo al Strigospegul' kaj kiel li tranĉe malfermis sian ĉevalon kaj staris en ĝi.

En la lando Lunjeburgo, en Celo, tie Strigospegul' faris aventuran bubajon. Tiel ke la duko de Lunjeburgo malpermesis al li la landon kaj, se oni trovis lin en ĝi, ke oni lin kaptu kaj poste pendumu. Pro tio Strigospegul' tamen ne evitis la landon. Kiam lia vojo lin kondukis tien, li rajdis aŭ iris tra la lando.

Nun iam okazis, ke Strigospegul' volis rajdi tra la lando Lunjeburgo. Tiam la duko renkontis lin. Kaj kiam li vidis, ke estis la duko, tiam li pensis: «Se tiu nun estas la duko kaj ci ekfuĝos, ili preterrajdos cin per iliaj galopuloj kaj stange pikos cin sub la ĉevalon. Tiam do venos la duko ekkoleriĝinta kaj pendumigos min al arbo». Kaj sekve li elpensis rapidan konsilon kaj deĉevaligis sin kaj tranĉe malfermis al sia ĉevalo la ventron kaj elverŝis el ĝi la internaĵojn kaj starigis sin en la trunkon. Kiam nun la duko kun siaj kavaliroj venis alrajdante al la loko, kie Strigospegul' staris en la ventro de sia ĉevalo, tiam la servistoj parolis: «Vidu sinjoro, ĉi tie Strigospegul' staras en la haŭto de ĉevalo». Tiam la princo rajdis al li kaj parolis: «Ĉu ci estas tie? Kion ci faras ĉi tie en la kadavro? Ĉu ci ne scias, ke mi malpermesis al ci mian landon, kaj se mi trovis cin en ĝi, ke mi pendumigos cin al arbo?». Tiam li parolis: «Ho, plej afabla duka kaj princa moŝto. Mi esperas, ke vi pardonos min kun la vivo. Mi tamen ne agis tiom malbone, ke estas penduminde». La duko parolis al li: «Venu proksime al mi kaj diru al mi cian senkulpon. Kaj kio ci do intencas per tio, ke ci tiel staras en la ĉevalhaŭto?». Strigospegul' elvenis kaj respondis: «Via duka kaj altranga princa moŝto! Mi zorgas pri via malfavoro kaj timas multe malbone. Tamen dum mia tuta vivo mi aŭdis, ke ĉiu havu pacon inter siaj kvar fostoj». Tiam la duko ekridis kaj parolis: «Ĉu ci nun estonte restados ekster mia lando?». Strigospegul' parolis: «Afabla sinjoro, kiel via princa moŝto volas». La duko rajdis for de li kaj parolis: «Restu tia, kia ci estas».

Kaj Strigospegul' rapide saltis el la ĉevalo kaj parolis al sia morta ĉevalo: «Dankon akceptu, mia kara ĉevalo. ci savis mian kolon kaj konservis mian vivon. Kaj ci krome rehavigis al mi afablan sinjoron. Kuŝu nur ĉi tie. Pli bone estas, ke la korvoj manĝegu cin, ol ke ili estus manĝegintaj min», kaj tiel piede li forkuris.

Noto al la de Til' dudek-kvina historio

Tiu estas beleta historio. Ĝi montras tre klare la ambivalencon, kiun Strigospegulo ofte renkontas ĉe la personoj, kun kiuj li rilatas. Oni abomenas lin pro liaj friponaĵoj kaj fekaĵoj, oni malpermesas al li la landon, sed samtempe oni ne malofte devas ridi pri li kaj ne eblas efektiviĝi la tro severajn minacojn. Strigospegulo trovas afablan sinjoron, kaj ties vortoj «Restu tia, kia ci estas» montras, ke tiu divenas la fikcian naiŭtecon de la vagulo.

Beleta estas ankaŭ la funebra parolado, kiun Strigospegulo adresas al sia oferita ĉevalo.

Elgermanigita de: Rikardo Sulco

St. Gérard 14. 5. ĝis 22. 5. 1977

El kvin landoj infanoj kaj gejunuloj kunvenis en la junulargastejo de Saint Gérard en Belgio. Ili estis akompanitaj de siaj geinstruistoj kaj pluraj gepatroj.

52 geknaboj kune kun ges-roj Peek, Ruff kaj Sonabend venis el Germanio, 18 geknaboj kaj ges-roj Magadure kaj Benistant el Francio, el Nederlando 48 geknaboj kune kun la geinstruistoj Hagedorn, Mensen kaj Van Tol, akompanataj de pluraj helpemaj gepatroj, 14 gejunuloj alvenis el Zagreb kun fraŭlino Hudecek kaj la gastigantoj de Saint Gérard lernejo, 16 esperanto-infanoj kun sia lernejestro, s-ro Sondervorst, samtempe ankaŭ la lernejestro de la Internacia Lernejo.

Entute 148 geknaboj kaj 18 geinstruistoj de 10 klasoj el 5 eŭropaj landoj ĉeestis en St. Gérard por partopreni la Unuan Internacian Lernejon organizitan de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). La geknaboj 9-11 jaraĝaj estis dividitaj en 8 klasoj, en ĉiu el la ok klasĉambroj, estis infanoj el ĉiuj 5 landoj. La fakoj estas Esperanto, Geografio, Eŭropa fako, Matematiko, Sporto, Kanto kaj Desegnado.

Ĉiu klaso ricevis horarplanon. La studhoroj estis limigitaj je 30 minutoj por ne tro streĉi la junajn infanojn. Forte impresas la lernlaboro inter instruisto kaj gelnantoj. Interesa konstato estas, ke la infanoj efektive lernas pere de la I.L. Ĉu en komuna lernado de Esperanto, ĉu en aliaj fakoj, la infanoj atente sekvis la instruadon kaj komprenis!

La instruado bone funkcias, sed oni devas ankaŭ aktivigi la infanaron posttagmeze kaj post la vespermanĝo. La internacia kolegio solvas la problemon: sportaj ludadoj, konkursoj, kantadoj, prezentadoj harmoniigas la tagojn.

Tuttaga ekskurso okazis al Bruselo kaj Waterloo. La infanoj admiras la modernajn stratojn. Antaŭ la reĝa palaco ĉiuj tri aŭtobusoj haltas. Multaj infanoj fotas ĝin. La reĝa gardisto antaŭ la pordego gajnas la apartan intereson. Impresas la infanojn, ke li ne movas sin, ne parolas. «Kiel plumba soldato», diris unu. Subite li marŝas 15 paŝojn dekstren kaj 15 paŝojn maldekstren. Li turnas sin tute cirkle. La infanoj ne komprenas, kial li faras tion. Preterveture la reĝajn ĝardenojn ili konvinkigis, ke la reĝo devas esti tre, tre riĉa. Multaj impresoj: la strato de la belaj artoj, la tribunalejo, la urbdomo, la bordo de la Maas. La malnovan kvartalon kun la artaj trabfakmuraj konstruaĵoj kaj domegoj ni ĉiuj piede trairas. Fine la infanoj ekvidas la «Männeken Piss», la knabinoj iom pli interese ol la knaboj. Kompreneble multaj fotas. Kaj tiam estas nerezistebla alirpunkto la magazenoj por memoraĵoj. Tamen, nia internacia edukado jam efikas: la germanaj infanoj ĉiam dividas per 15 por germana valuto, la nederlandaj infanoj simile, la francaj infanoj proksimume dividas per sep, kaj la jugoslavaj per du. La kalkulado ne estas absoluta bremsado por aĉeti, sed la infanoj pripensas. Ekonomiaj vidpunktoj de la I.L. sur la stratoj de Bruselo. La unua objekto aĉetita estas Männeken Piss, la dua pupoj. Mi konstatas, niaj infanoj estas regitaj de la sama animo kiel niaj politikistoj: unue elspezi la monon, poste ŝpari.

Tra malvastegaj stratoj ni remarŝas al la aŭtobusoj por iri al la planita tagmanĝejo: bela lunparko. La internacia infanaro elsvarmas uzante la karuselojn diversspecajn ktp. Post du horoj la infanoj plimulte estas bankrotaj.

La internacia taĉmento nun aŭtobuse moviĝas al Waterloo, la loko kaj malbona sorto de la granda korsiko Napoleono, la unu sola vera imperiestro de la francoj. La infanoj rigardas la batalon en la panoramo. Forte ili estas impresitaj: mortaj ĉevaloj, mortantaj homoj, mortaj homoj: eliminataj vivantaĵoj. Kial? Oni povas klarigi multe, sed komprenigi? La eŭropaj infanoj lernas la pacon, la bazo de ĉia homa evoluado!

Cetere: la ĝenerala sekretario de la Eŭropo-konsilantaro, s-ro Ackermann telegrafis: Pro ne antaŭvideblaj cirkonstancoj mi bedaŭrinde ne povas veni al Saint Gérard. Mi deziras al la I.L. multe da sukceso!

Reveninte post la 18-a en la junulargastejo ni manĝis nian «tagmanĝon». Post la 21-a la infanoj estas en la ĉambroj kaj la internacia kolegio konferencas.

Ĉiam pli kaj pli boniĝas la profilo de la I.L. La lernada disciplino en la klasoj estas mirinda. Ni estas vizitataj de triopa gejunula grupo. Ĝi intencas televide filmi la infanojn en la diversaj klasoj por kapti impresojn. Mi donas televidan intervjuon kaj parolas pri la esenco de I.L. Intertempe la klasoj jam laboras konsiderante la prezentadon kaj sabatan ekspozicion. Ĝi estos desegna kaj skriba: ni eŭropaj infanoj, niaj domoj. kion ni volonte manĝas, kion ni povas aĉeti per..., la najbaro apud mi, nia ekskurso al Bruselo, ktp. La nokta konferenco ĝemas, tamen detaligas la programon. La estraro de ILEI ne mirus, ĝi konas la kutimon de sia prezidanto, estrarkonferenci ĝis malfrua nokto. Tamen: koleginio Ruff, sinjorino Peek kaj Magadure elektas la ekspozician materialon kaj preparas ĝin.

S-ino Mensen perfekte transformis sian klasĉambron en akceptsalonon.

En la kapelo Saint Gérard de la monaĥejo junulargastejo kolektiĝas la eŭropaj in-

fanoj, avantgardo de Eŭropo: komuna eŭropa sento, komuna eŭropa lingvo, komune ĉiuj ekzercas sin en ĉiuj komunaj aranĝoj.

La adiaŭa vespero okazas vendredon. Sabato jam estas la lasta tago kaj ne taŭgas, ĉar jam dimanĉon la unuaj reveturos frue. Ĉiuj, ĉu francoj, belgoj, nederlandanoj, juĝoslavoŝoj aŭ germanoj prezentas kulturajn de la propra nacio.

Sabato estas la granda tago por la internacia «grandfamilio». Posttagmeze venos multaj gastoj. La triopo (s-inoj Ruff, Magadure kaj Peek) alkroĉas la elektitajn bone preparitajn ekspoziciaĵojn al la muro de la tre longa kaj taŭga koridoro. Preskaŭ ĝis la lasta minuto antaŭ la malfermo ili laboras. En la kapelo estas ĉiuj seĝoj aranĝitaj. Multaj infanoj helpis. Kolego Magadure majstre gvidas kaj ekzercas niajn infanojn de la Internacia Lernejo en la kantado. Multaj gekolegoj helpas por kunteni la svarmon.

Ek de la dua horo posttagmeze la Internacia Lernejo portas sian «belan robon». Ĉiuj estas pretaj por la gastoj. Ili venas kaj aŭskultas Esperanto-studhoron. Ili estas: la ĝenerala inspektoro de Belgio, s-ro Andreanne, kaj kelkaj inspektoroj.

Post la interesa studhoreto la altaj gastoj kolektiĝas en la kapelo de St. Gérard. Eminentaj vilaĝanoj plenigas preskaŭ la tutan kapelon. La eŭropaj infanoj nun estas unuo — kvankam la paroloj por ili estas tro longaj — ĉar ili staras la tutan tempon, la publiko sidas. Kaj poste ili prezentas sin. Ne plu estas sovaĝa malordo kiel komence de la semajno. Estas nun komuna sento de unueco, de amikeco, esprimantaj sin en kantado kaj prezentado. Ĉiuj ĉeestantaj gastoj kore aplaŭdas. Mi sidas dum la infana prezentado apud la ĝenerala inspektoro, s-ro L. Andreanne, kiu bonege parolas la germanan lingvon. Tial mi povas informi lin pri la internacia eksperimento. Post la infana prezentado ni rigardas la ekspozicion. La ĝenerala inspektoro tre interese rigardas la verkojn de la infanoj kaj ne nur ĝentile demandas multe. Li mem sen instruo tradukas multajn vortojn. Do, Esperanto ne estas problemo por tiuj, kiuj vere volas lerni ĝin.

La ĝenerala inspektoro de Belgio, s-ro Andreanne, samopinias kun mi: Esperanto estas la taŭga lingvo kiel baza por tiuj, kiuj volas lerni aliajn fremdajn lingvojn.

Mia surskribo estas: *kontentiga rezulto, eble pli.*

La Internacia Lernejo disiras. Por ĉiam? Mi kredas ke ne! Eĉ kritikema koleĝino — malgraŭ kelkaj neglataĵoj — fariĝis enpenŝema. Unika eksperimento kontentige sukcesis.

Informis

Helmut Sannabend

LA HOMAJ RAJTOJ EN LA EŬROPA KONSILIO

Se longatempe la HOMAJ RAJTOJ restis precipe kiel jura filozofio kaj moralaj principoj, kiuj pli inspiris ol fondis la juĝajn decidojn, de post la lasta Mondmilito la Deklaracioj pri Homaj Rajtoj per Konvencioj pli kaj pli aplikiĝas tiel doktrine kiel jurisprudenco en la juraj reguloj mem kaj ties sankcioj.

—oOOo—

Tiel de la 7-a ĝis la 11-a de februaro 1977 en Strasburgo la DIREKTO-KOMITATO por la Homaj Rajtoj pritraktis interalie:

- la kompetentecon de la Eŭropa Kortumo pri la Homaj Rajtoj por antaŭjuĝe decidi laŭ peto de nacia jurisdikcio;
- la rekomendon de l'Parlamenta Asembleo rilatan al la rajtoj de l'malsanuloj kaj mortantoj;
- la subpreman sankcion de falsaj depozicioj kaj koneksaj agoj antaŭ la Eŭropaj Komisiono kaj Kortumo pri la Homaj rajtoj kaj antaŭ la Komitato de l'Ministroj;
- la sintenon de l'Ŝtatoj-Membroj koncerne la Pakton de l'Unuigintaj Nacioj rilate al la civilaj kaj politikaj rajtoj kaj ĝian fakultativan protokolon;
- la protektadon de la fundamentaj rajtoj en la Eŭropa Komunaĵo.

—oOOo—

Tiel de la 28-a de februaro ĝis la 11-a de marto 1977 en Strasburgo la 126-a sesio de la Eŭropa Komisiono pri la Homaj Rajtoj okazis en la Palaco de l'Homaj Rajtoj kaj ekzamenis 160 individuajn postulojn konforme al la art. 25 de la Eŭropa Konvencio pri la Homaj Rajtoj.

Ekzemple la Komisiono ĵus transdonis al la Kortumo la aferon Tyrer. Temas pri brito, kiu la 7-an de marto 1972 estis kondamnita pro molestado kaŭzinta korpan damaĝon ricevi tri vipobatojn laŭ la leĝo de Mansk-insulo, kaj kiu post malakcepto de lia apelacio suferis sian punon la 28-an de aprilo samjare.

S-ro Tyrer invokis en Strasburgo plurajn artikolojn de la Eŭropa Konvencio kontraŭ la Brita Ŝtato. En julio 1974 la Komisiono deklaris la postulon akceptinda laŭ la artikoloj 3 kaj 14 de la Konvencio. (Ĉar en la insulo la vipopuno aplikiĝas nur al virseksaj infanoj kaj adoleskantoj, la Komisiono konsideris, ke la puno povas esti diskriminacio pri aĝo kaj sekso.)

Nun la Kortumo ekzamenigos la aferon per ĉambro de sep juĝistoj, kiuj decidis surbaze de raporto de la Komisiono kaj de la observoj de la Brita Registaro kaj Komisiono.

—oOOo—

Cefaj artikoloj de la EŬROPA KONVENCIO pri la Homaj Rajtoj. 2. Rajto je vivo. — 3. Malpermeso de torturo kaj punoj aŭ traktoj malhumanaj aŭ malnobligaj. — 4. Malpermeso de sklaveco, servuteco kaj punlaboro. — 5. Rajto de ĉiu persono je libereco kaj sekureco. — 6. Rajto je justa proceso antaŭ tribunalo sendependa kaj senpartia starigita de leĝo. — 8. Rajto je respekto de privata kaj familia vivo, de domicilio kaj korespondado. — 9. Libereco de pensado, opinio kaj religio. — 10. Libereco de esprimado. — 11. Libereco de paca kunveno kaj asociiĝo. — 12. Rajto je geedziĝo kaj fondo de familio. — 13. Rajto je efektiva apelacio antaŭ nacia instanco. — 14. Malpermeso de diskriminacioj en la ĝuo de l'garantiitaj rajtoj. — 25. Rajto je apelacio por la individuaj personoj, la ne-registaraj organizaĵoj aŭ grupoj de unuopuloj. — 30. Raporto de la Komisiono en okazo de interkonsenta finarango. — 31. Raporto de la Komisiono «*se unu solvo ne povis interveni*».

—oOOo—

Tiel en la Eŭropa Konsilio la Homaj Rajtoj jam ne estas vanaj vortoj.

Jean Thierry

MAJSTROVERKO DE FUŜADO

En Finnlando aperas dekduvoluma Granda Enciklopedio de Otava, kiu atingis sian duan volumon kaj en ĝi troviĝas artikolo pri esperanto. La enciklopedioj de Otava (la due plej grava eldonejo kaj la ĉefa publikiganto de enciklopedioj dum la pasanta jarcento en la finna lingvo) formas la angulŝtonon de la finna kultura vivo.

Esperanto-Asocio de Finnlando fondis la informan fakon kaj komisiis por tio viron, kiu ne kompetentas en informado nek verkis artikolojn pri esperanto en la finna. Nun tiu viro sin trudis submaske de la informa fako por verki la artikolon al tiu prestiĝa enciklopedio. Jen aspektas tiu «artikolo»: deko da eraroj, duonveroj, misprezentoj en duonpaĝa spaco.

—«Okulisto L. Zamenhof kompilis esperanton 1887», skribas nia kavaliro. Jen etiga misprezentado pri la krea laboro de Zamenhof, kaj fakte Z. publikigis sian «unuan libron» en 1887. Li projektis, planis, kreis sian lingvon dum ĉ. 15 jaroj, paroli pri «kompilado» estas sakrilegio!

—La artikolisto aludas al lernejaj eksperimentoj, ke «ili montris, ke esperanto estas pli facile lernebla ol la naciaj lingvoj». Jen vera nulvalora informado pri la transferenca efiko de esperanto je la lernado de naciaj lingvoj, kiel montris ekz. la lerneja eksperimento en Somero.

—La artikolisto asertas, ke Vilho Setälä tradukis la finnan epopeon Kalevala en esperanto. Ĉiu ja scias ke tion faris ĵurnalistoj kaj poeto Johan Edvard Leppäkoski el Jyväskylä. Pli ĉagrenan, pli mens-skuan eraron eĉ la plej konsekvenca malamiko de esperanto apenaŭ povus enmondigi!

—La artikolisto asertas, ke MEM (Mondpaca Esperantista Movado) estas laborista organizo... dum fakte ĝi estas pac-organizo sur la «Moskvaj reloj».

—Nia kavaliro asertas, ke «el esperanto estas poste kompilita simpligita kaj parte ŝanĝita versio, ido-lingvo, kiu restis en la ombro de esperanto. Tia enŝovo en la artikolo pri esperanto estas nepardonebla sencerbaĵo. Same li prezentas ke novial estas bazita sur esperanto!? Duobla sensencaĵo!

—En la referenco la artikolisto aludas: J. Lapenna: La Internacia Lingvo, dum li devus aludi: I. Lapenna & aliaj: Esperanto en Perspektivo. Ivo ja komenciĝas per I, kaj kial aludi al la prototipo de jam aperinta prestiĝa EeP?! Naive!

La tuta artikolo aspektas kvazaŭ skribaĵo de popollernejano, sen ajna objektiveco, mankas eĉ lingvistika priskribo de esperanto. Por la antaŭaj enciklopedioj la konata pioniro de esperanto Vilho Setälä (Filozofia doktoro h.c. 1973) estis invitita verki pri esperanto, sed ĉi-foje sukcesis «iu malfeliĉa fuŝulo» sin trudi por damaĝi la reputacion de esperanto, la prestiĝon de la Granda Enciklopedio de Otava kaj sian propran honoron. Kion tio instruas al ni? Fervoro ne estas kompetento.

Jaakko Kelohonka

Utila laboro, kulturaj aranĝoj, distraĵoj kaj refreŝiga ripozo — jen kion havos la partoprenantoj de la 4-a Internacia Konferenco de NEM. Detaloj pri aliĝeblecoj troviĝas sur la aliĝilo aldonita al ĉi tiu numero de «Horizonto».

LA LASTA TENDARO DE JUNAJ ESPERANTISTOJ EN HERBORTICE — BOHEMIO

Dum regado de Dubček estis denove permesita Ĉeĥa Esperanto-Asocio, kiu en marto 1969 havis sian unuan kongreson en Brno. Tie fondiĝis diversaj sekcioj, interalie ankaŭ KELI kaj IKUE. Kelkaj kapablaj homoj de IKUE pritraktis la eblecon de feriado de kristana junularo. Estis elektita Herbortice apud Landškroun — nordorienta Bohemio, nularo estis en bonaj manoj kaj revenis post du semajnoj tute kontenta. Venontjare ili invitis ankaŭ siajn eksterlandajn amikojn. Post kelkaj jaroj, kiam la situacio en la lando pliakriĝis, malaperis la nomo «kristana» kaj restis nur «tendaro de junaj esperantistoj». Ĉiujare tendumis la samaj homoj. El infanoj kreskis junuloj kaj fraŭlinoj. Ili vidi la sekciojn de KELI kaj IKUE, ili ĉiuj eniris la sekcion de MEM kaj denove somere tendumadis en la ĉarma valo de Herbortice. Estis tendaro de junaj esperantistoj-MEM-anoj. Malgraŭ la stranga firmao, ili vivis kune, kiel antaŭ jaroj, kiam ili komen- cis tendumadi.

En la nuna jaro 1977 okazis jam la naŭa tendaro en Herbortice ĝi komencis la 24-an de julio. Ceestis pli ol 100 junaj esperantistoj, inter ili ankaŭ iu ĉeĥa pastro kaj iu pastro el Pollando. Vivo kiel en la aliaj tendaroj. Matene kursoj de Esperanto, tagmezmanĝo en vilaĝa gastejo, posttagmeze ludoj, vespere bivakfajro kaj kantado.

Estis pluva tago. Grupo da gejunuloj marŝis al la gastejo por partopreni la kurson, kiu dum pluvo ne povis okazi en la naturo. Pastro akompanis la grupon. Kiam ili forlasis la arbaran vojon, ili rimarkis polican aŭtomobilon, el kiu elkuris du viroj kaj invitis la pastron en ĝin. Tie ili montris lian fotografajon al li kaj demandis: «Ĉu vi estas tiu pastro?» «Jes, mi estas!» li trankvile respondis. «Kaj kion vi faras ĉi tie?» «Mi instruas Esperanton al tiu junularo». La sekreta policanoj rediris: «Ne, vi faras ĉi tie kontraŭlegan religian agadon!» Post iom da demandesplorado ili forlasis la pastron el la aŭtomobilo. En la tendaro oni jam eksciis pri tiu epizodo kaj tuj kaŝis ĉiujn religiajn kantaretojn.

Poste iaj homoj, tre verŝajne sekretaj policanoj, vizitis la tendaron, kaj sub la preteksto, ke ili zorgas pri la pureco de la junularo, ili faris kontrolon de la tendaro. Plej severe estis kontrolitaj la tendoj de la du pastroj. Unu pastro nokte vizitis necesejon, kiu staris malantaŭ la tendaro. Surprizis lin du sekretaj policanoj, kiuj postulis legitimilon de li. La tuta tendaro estis ĉirkaŭita kaj gardita de la sekreta ŝtata polico. Se iu pastro volis forlasi la tendaron, tuj estis postulita legitimilo de li, kaj li estis deman- dita, kien li iras.

Tendarestro Svaček estis invitita al la Loka Nacia Komitato, kie en deĵorejo li estis demandesplorita de la sekreta polico kelkfoje dum la tendumado. Ili diris al li, ke li ruze enpenetris en MEM kaj misuzas la tendaron por kristana edukado de la junularo. Ili minacis al li, ke li baldaŭ ekstaros antaŭ prokuroro en juĝejo.

En la lastaj tagoj de la tendaro oficisto de la Nacia Komitato invitis tendarestro Svaček kaj malpermesis la tendaron en la estonteco. Komprenoble ne pro tio, ke ili havis pastrojn en la tendaro. Tute ne. La kaŭzo estis, ke la distrikta higienisto konstatis, ke la akvo ne estas taŭga por uzado en la tendaro. Malgraŭ tio, ke dum naŭjara tendumado neniu malsaniĝis de tiu akvo, nun ĝi ne estas uzebla, kaj la junaj esperantistoj ne rajtas tie tendumi!

Venis la lasta tago. Lastafoje estis hisita la flago, lastafoje estis legita la taga ordono de la tendarestro Svaček, kiu plene regis sin, kvankam ĉiuj tendaranoj havis larmojn en la okuloj. Ili sciis, ke estas fino de tiu belega libertempo, kiun ili travivis ĉiujare somere. Nur rememoroj restos al ili. Sed kio okazos al ilia ŝatata tendarestro Svaček? Tion montras la estonta tempo.

Ĉeĥa Esperanto-Asocio estas kolektiva membro de UEA. Ĉu la hodiaŭa UEA almenaŭ protestos? Mi ne kredas!

V.

DONACOJ POR «HORIZONTO» — 1977

<i>Cisnuna sumo</i>	24.575 ptoj.
Max Lehner, Kirchbach (Aŭstrujo)	290 »
Anonime (Aŭstrujo)	125 »
Felix Primetzhöfer, Aspach (Aŭstrujo)	160 »
	25.150 »

aŭ KROM TIO, KIEL JAM KONATE, ĈIO IRAS GLATE!

En la maja numero 5/77 de BULGARA ESPERANTISTO Ida Lisiĉnik (Kutaisi, USSR) publikigas artikolon, kiun la redakcio juĝas «grava». Temas pri «Stagnado de Esperanto!» Kio estas la okazo kritikaĉi ĉion ĝis nun faritan: «En la E-kunvenoj oni kuirigas en la propra saŭco, ŝi ja skribas, sed iun praktikan celon aŭ terenon por uzado de la lingvo oni preskaŭ neniam trovas, se ne konsideri la korespondadon». Nu, la kritiko mem (eĉ nur parte prava, sed kiu kulpas?) verdire servas kiel saltotabulo por svingiĝi tra la politika spaco: atentu pri la 'ruĝa' fadeno! «Kompreneble, estus malĝuste ne rimarki la kreskantan tendencon transiri al praktika uzado de Esperanto en turismo, fervojo, komerco, batalo por paco ktp. [Substreko mia]. Ni havas iam iujn sukcesojn en Bulgario, Jugoslavio, Pollando ka. [Jen sendube ia konfeso!] Kun granda ĝojo mi tralegis en J. «KOMSOMOLSKAJA PRAVDA» de la 3 de aŭgusto 1976 en la artikolo «Por solidareco, paco kaj amikeco», ke al la tutmonda kampanjo «La junularo senmaskigas la imperiismon» aliĝis centoj da plej diversaj junulaj organizaĵoj, eĉ ne apartenantaj al la Federacio de Demokratia Junularo, kaj inter ili «eĉ internacia organizaĵo de 12 esperantistoj, deklaranta principon de nepolitikemo, [oni ne konfuzu deklaron kaj agon!] sed kiu tamen opinias, ke oni povas kunlabori kun la Federacio por senmaskigi la intrigojn de la imperiismo en la spirita vivo kaj kulturo». [Vetinde, ke ne temis pri «imperiismo» kontraŭ minoritataj lingvoj en USSR! Sed ni plu konsideru ŝian komenton.] Interesa estas tiu «eĉ internacia organizaĵo de la esperantistoj». Ja la unuan fojon [ĉu vere?] oni aŭdas pri manifestiĝo de esperantistoj en neesperanta internacia forumo. Bedaŭrinde, tiu salutinda debuto ne estas tre logika: ĉu la kunlaboro kun la Federacio de Demokratia Junularo por senmaskigo de la imperiismo, estu ĝi nur en «la spirita vivo kaj kulturo», konformiĝas kun «nepolitikemo»? [Nu, tiel tian demandon ne ni metas!] Jen ankoraŭ unu pruvo, ŝi tiam plu sturmas, pri la absurdo de nia fama neŭtraleco, kiu fakte neniam ekzistis, kaj kiu, interalie, estas unu el la sufiĉe gravaj kialoj de la stagnado de la E-movado, ĉar ĝi detenas la partoprenon de la esperantistoj en la batalo kontraŭ la krimoj de la imperiismo, en la laboro kaj aktivecoj de la tutmonda progresema junularo. [Jen almenaŭ plia atako kontraŭ la neŭtraleco!] Sufiĉas jam nur kanti himnojn al nia «kara Esperanto». Jam de longe venis la tempo, ke la esperantistoj ludu aktivan rolon en ĉiuj progresemaj internaciaj organizaĵoj, ke ili kuraĝe aŭdigu siajn voĉojn ne nur por Esperanto, sed ankaŭ per Esperanto, ke ili helpu la venkon de ĉiuj progresemaj, humanaj ideoj de nia epoko, ignorante la falsan neŭtralismon». Guste per tiaj serenecaj vortoj verŝajne sin forlogis kaj kaptis multaj ĝajnunuloj de la iama TEJO, kaj tial ni citas ĉi tiun longan ekstrakton, kiu konfirmas la artikolojn de HORIZONTO. Notinde, ke la redakcio de BULGARA ESPERANTISTO (Sofio, p.k. 66), kiu 'akceptis' ŝian kontribuojn nur en 'Libera tribuno', «petas ankaŭ aliajn esperantistojn esprimi ŝian koncepton pri la problemoj starigitaj en la grava artikolo de s-animo Lisiĉnik». Restas observinda afero, ĉu iam aperos unu kontraŭa opinio, ĉar krom tio, kiel jam konate, ĉio iras glate!

—oOo—

Male, en la maja numero de ESPERANTO «la grandega analiza laboro farita de s-ro Tjerk Boersma» koncerne la enketon pri la revuo sub-strekas ian deziron de neŭtraleco. Efektive pri la demando «ĉu la revuo respektas la statutan neŭtralecon de UEA», «92,3 % opinias la revuon senriproĉa ĉi-rilate, dum 4 % neas la neŭtralecon... 0,3 % ŝanceliĝas inter jes kaj ne, kaj 3,4 % ne esprimas sin...». Nu, tia «grandega plimulto» (supra je 90 %) kutime vidiĝas nur en totalismaj reĝimoj, sed precipe estas vero, ke «el 6859 ricevantoj de la revuo — do ankaŭ de la enketilo — dum la pasinta jaro, (nur) 701 resendis la demandaron». Kio ne maltrafe lasas konjekti, ke pri tia fundamenta demando respondis nur malplimulto da batalantoj (plejparte apogantoj de la partipolitikaj gvidantoj), kiuj nepre deziras konservi por sia agado kvazaŭ mantelon de neŭtraleco, dum la aliaj aŭ pro indiferenteco, aŭ pro neglektemo, aŭ eĉ pro ia timemo de «nekonformismo», ne kuraĝis esprimi opinion! Sed, krom tio, kiel jam konate, ĉio iras glate!

—oOo—

Aliflanke, la redaktoro Simo Milojeviĉ en la sama numero flatas la gvidantaron laŭ sia kutima emfazo inda je konataj reĝimoj: «Tio kio pleje imponas ĉe la nuna Estraro, estas la fakto, ke ĝi dum la lastaj tri jaroj sukcesis prezentiĝi al la Movado kiel kohera kolektivo kaj ne nur kiel hazarda kolekto de kiom ajn brilaj kaj valoraj unuopuloj». Tiel! Kvazaŭ nur unufoje regus solidareco (se ĉi tiu nuna ja ne estas nur ŝajna) inter la membroj de UEA-estraro! Evidente la estraro de Londono, malgraŭvole altrudita al la prezidanto en 1971, estis senkohera, ĉar kunmetita el kontraŭstaraj anoj, sed tio mem estis intence farita de tiuj, kiuj ĝuste jam ekregis la Komitaton kaj nun gvidas. Kaj antaŭ ol tiu estraro de Londono, de post la lasta Mondmilito ĉiuj estraranoj (kun la escepto de s-ro E.L.M. Wensing) plene harmonie kunlaboris. Dume, post tri jaroj da proponoj likvidiĝis la komisiono por la nova statuto, pri kiu daŭre ellaboras novan pro-

jekton la estrara «kohera kolektivo»! Cetere oni povas demandi sin, ĉu la nederlanda registaro konsentis por la asocio daŭrigon de la jura personeco per la malnova, alidire ankoraŭ nuna statuto, ĉar krom tio, kiel jam konate, ĉio iras glate!

—oOo—

En la junia numero du faktoj meritas atenton. El la jarraporto vi povas legi: «5. Institucio Hodler '68»... «La Estraro de UEA nomis du pliajn estraranojn: s-ro E.L.M. Wensing (Belgio) (?) kaj s-ro E.J. Woessink (Nederlando)». Kaj plue post kelkaj linioj: «...La administranto anoncis sian definitivon el tiam funkcio je la fino de 1976...». Kiuj memoros, legante tion, ke la «administranto» estas la iniciatinto de «Institucio Hodler '68», f-ino M.H. Vermaas, kiun antaŭ ĉ. dek jaroj jam el la direktoreco de la C.O. sukcesis demisiigi la nederlanda duopo E.L.M. Wensing kaj E.J. Woessink, tiuj tuj komprenos, kion signifas la frazo «la administranto anoncis sian definitivon el tiam funkcio». Sub la punkto 12. A. vi povas legi ankaŭ: «Kroma instigo por ĉiu kontaktado estis la kolektado de la statutoj (en Esperanto) de ĉiuj landaj asocioj, kio fine sukcesis. Evidentiĝis, ke ne ekzistas kaŭzoj por plendoj kontraŭ iu ajn el la statutoj». Tiel! Kio ankoraŭ montras la bezonon de neŭtraleca mantelo! Sed kiu konas ja la veron interalie pri la statutoj de Bulgara Esperanto-Asocio kaj Centra Laborrondo Esperanto en Kultureligo de GDR, tiu ĝuste prijuĝos la valoron de tia raporto pri «kontaktoj kun landaj asocioj», kiujn «plu flegis» aparte d-ro W. Bormann, kaj tiu scipovos legi inter la linioj de la «kohera kolektivo» estranta la asocion, ĉar krom tio, kiel jam konate, ĉio iras glate!

—oOo—

Se tiel insiste kontraŭ ĉiaj evidentaj ESPERANTO pretendas, ke ĝi restas (kiel la asocio) neŭtrala, HEROLDO DE ESPERANTO, kompanse, en sia maja numero 9 neniel sentas saman skrupulon pri neŭtraleco; kaj tiu gazeto, sin nomanta antaŭe kun fiero «sendependa», sed nun «duonmonata internacia organo de la Esperanto-movado», kva-zaŭ ĝi estus la oficiala organo, jam ne hezitas publikigi sur la unua paĝo la oftajn kaj pli kaj pli politikigantajn konkursojn de la Pola Radio. Jen la tipaj demandoj, al kiuj ĝi kuraĝigas siajn legantojn respondi, ĉar «eĉ unu respondo sufiĉas».

1) *Kiajn propronojn prezentis la socialismaj ŝtatoj — membroj de la Varsovia Traktato, dum ilia bukureŝta konferenco en novembro 1976? Kiel vi aprezas tiujn ĉi iniciatojn?*

2) *Kion vi opinias pri ebloj de internacia kunlaboro en Eŭropo en la sfero de la energetiko, transporto kaj protektado de la natura medio?*

3) *Kiel vi rilatas al la proksimiĝanta renkontiĝo de la sigelintoj de la helsinkia Konferenco pri la Sekureco kaj Kunlaboro — en Beogrado? Kion vi atendas de tiu ĉi renkontiĝo?*

Ja, kial respekti neŭtralecon, se la granda plimulto restas tombe silenta kaj ŝafe sek-vanta? Jen krom tio, kiel jam konate, ĉio iras glate!

J. T.



“Agadi per lernolibroj, anoncoj, k.t.p. estas tre bone kaj necese; sed tio ĉi devas havi lokon *apud* la literaturo kaj ne *anstataŭ* la literaturo.”

L. L. Zamenhof

LIBROJ SUB LA LUPEO

IMITINDE

Ne malofte oni aŭdas bedaŭron, ke Esperanto ne penetras la profesion vivon; sed anstataŭ bedaŭro la prava demando estas: ne *kiu* kulpas? sed *kion* mi persone faris tiucele? Ja al fervorulo multaj okazoj ebligas enŝovi la lingvon, kiel montras Jean-Louis Saudian-Rousseau.

Ĉar li estis petita verki plurlingvan frazaron por la benzinejaj deĵofrantoj de la petrolfirmo «Antar» en Francio, li tuj

proponis aldoni al la kvin lingvoj (franca, itala, hispana, angla kaj germana) ankaŭ la Esperantan; kaj lia propono estis akceptita tiel, ke en paĝo de la profesia magazino «réseau a» (jul. aŭg./77) sub la titolo: «Estu poliglota pumpisto» vidigas en la mezo celtrafa elekto da terminoj en Esperanto kun la konsila enkonduko: la Esperanto-parolantaj klientoj vi rekonos per la verda stelo algluita sur ilia aŭto.

Sed eble kelkaj estas jam inklinaj pensi: «Ba! Kia efiko!». Nu, jen kio estus

plena eraro: oni ne forgesu la «guton», kiu «traboras monton granitan»! Kiel skribis d-ro L. L. Zamenhof, «riveretoj fluas al riveroj»; kaj nur per amaso da paŝetoj ni iom post iom sukcesos aperigi en la profesian vivon la komunan lingvon! Gratulon al Jean-Louis Saudian-Rousseau.

J. T.

JES, ESPERANTO ESTAS LINGVO! Respondo al Spang-Hanssen (Dana Lingvisto) de I. Szerdahelyi, kolekto «Studoj» n.º 8, 42 paĝoj, Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds. 1976. Prezo: 3,70 sv. fr.

Oni legos tre profite tiun studon de Szerdahelyi. Li disbatas per scienca argumentado la ne pravigitajn atakojn al Esperanto.

La reguleco, la akuzativo, la fama vortabelo estas trafe traktitaj. Multajn legantojn surprizos la longa pritrakto de l' sufikso EJ, kies subsignifojn oni eble ne rimarkis dum la normala uzado.

En tiu studo abundas nomoj de lingvistoj, kies opiniojn la aŭtoro prezentas, kaj tridek-du bibliografiaj referencoj, tre vastaj, el pluraj lingvoj, finas ĝin. Ankaŭ ne mankas interesaj ekzemploj el la hungara, sanskrita kaj la rusa.

Tre rekomendinda kajero al ĉiu adepto, kiu volas koni pli profunde la «animon» de Esperanto.

Salvador Gumá

VORTO KAJ VORTELEMENTO EN ESPERANTO, de I. Szerdahelyi, kolekto «Studoj» n.º 10. Fako: Gramatika teorio de Esperanto. 1976. 16 paĝoj. Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds. Prezo: 3,05 sv. fr.

«Ankoraŭ neniu plaĉis al ĉiu». Ankaŭ ne la decidoj de la Akademio de Esperanto; kaj la jam malnova polemiko pri la karaktero de la vortradikoj, ŝajne jam forgesita revekiĝis kaj revigliĝis pro la asertoj de Szerdahelyi. Kiu estas prava? Ĉu la vortradikoj havas gramatikan karakteron? Ŝajnas al mi, ke ia «fatamorgano» konfuzas la komprenon de niaj kleraj teoriantoj. Eble, oni povas teorie akcepti la neŭtralecon de la vortradikoj; sed estas nekontestebla fakto, ke la natura rolo de vortradikoj pri *animaloj* kaj iliaj partoj (kapo, hepato, koro...), *vegetaloj* kaj iliaj partoj (branĉoj, folioj, radikoj...) kaj *mineraloj* kaj iliaj ĥemiaj rezultoj (sulfatoj, kloridoj, pulvoroj...) nature kaj esence estas substantiva, kaj mi dubus pri la saĝo de tiu homo, kiu vidante la vortradikojn *ĉeval'*, *brasik'*, *arĝent'*, *balen'*, *timian'*, *zink'*, kaj centoj da aliaj samspecaj, asertus serioze ke li perceptas en ili eĉ se nur spurojn de adjektiveco aŭ verbeco. Aliaj vortradikoj estas absolute abstraktaj.

La semantiko de ĉiu vorto diras al ni, kia estas ĝia «sargho», ĝia «animo», ĝia «gramatika karaktero» kondiĉanta la tutan postan roladon de la rezulta vorto. Al argumento, ke ne ĉiam la semantiko

estas ĝusta, mi respondas, ke por ĉiu vortradiko oni devis elekti, kaj Zamenhof elektis. Ni akceptu discipline la ĝisnunan fakton; de nun ni estu, se malkontentaj, pli klarvidaj!

Kiam temas pri homaj faradoj (iloj, objektoj, mebloj...), pri atributoj, pri agoj aŭ statoj, tiam verŝajne la semantiko ne koincidas tutmonde. Kiaj estas *Avar'*, *Kur'*, *Dorm'*? *Avar'* povus esti la homo (Avaro mortis) aŭ esprimi kvaliton: Avara homo, kaj sekve, ne Avaro, sed Avarulo mortis. En la unua supozo, *Avari* = agi avare, kiel avaro; en la dua supozo, = esti avara. *Kur'* kaj *Dorm'* enhavas ne konkretojn sed verbecojn. *Kur'* esprimas agon, *Dorm'* esprimas... ĉu agon aŭ staton? por ĉio tio, helpu filozofoj!! Zamenhof devis elekti.

Pri *Amanto* kaj *Konato* oni sciis ke nur konvencie kaj pro oportuneco ili signifas personon, ĉar nenio en ili estas persona. En juĝejoj, la benko por la akuzatoj ja ne estas la akuzata benko! kaj la floroj de la amanto ja ne estas la amantaj floroj!!

La studaĵo de Szerdahelyi estas tre klara, kaj pro la graveco de la temo mi uzis pli da tempo por legi ĝin ol por tuta romano.

La paragrafo 0.5 ŝokis min: «Vole-nevole: la ekzisto de senprecedenca universitata oficiala fako fariĝis divida linio inter du pensmanieroj: la malnova — strebanta ĉiumaniere konservi Esperanton en la ĝisnuna stagna stato por certigi tiamaniere por si la altan statuson en la ekstersista Esperantujo, kaj la nova — klopodanta ĉiurimede emancipi Esperanton, enigi ĝin en la establitan mondon, akceptigi ĝin en ĉiuj rilatoj far la sociaj, ŝtataj kaj sciencaj instancoj, unuflanke rigidigi, mumiigi la aferon, aliflanke — dissolvi ĝin en la sana, natura, normala homa medio».

Kiuj esperantistoj intencis do sekvestri Esperanton en la tombon de l' ekstersista Esperantujo por konservi ĝin stagne? Kafon kaj lakton oni miksas normale; sed ne seriozan lingvaĵon kaj subjektivan revaĵon. Teoriantoj restu en la kadro lingvistika evitante ĉion subjektivan aŭ personan, kvazaŭ enfermite en la scienco.

Resume, tre interesa broŝuro pri unu el la bazoj de la vortstrukturo. Oni legu, studu ĝin atente, sed aŭskultante same atente la sonorilojn de la «ekstersista Esperantujo, kie nia Afero stagnas rigide kaj mumie».

Salvador Gumá

ESPERANTO ET INTERLINGUA, Breve étude comparative, de Edo Bernasconi, en traduko de N. Piron, kolekto «Studoj» n.º 11. Fako: Kompara interlingvistiko. 1976. 25 paĝoj. Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds. Prezo: 4,65 sv. fr.

La studo de Bernasconi Edo estas vere interesa. Li komparas la konsiston de Esperanto kun tiu de Interlingua kaj aliaj

projektoj, bazitaj sur la latina aŭ kunmetaĵoj el la latinidaj. Li pruvas ke la facileco de tiuj projektoj, rezultanta el la tuja komprenebleco estas ŝajna, ne vera, ĉar la uzanto ne scias kiun formon elekti el la pluraj; por ekzemplo, ĉu -ori, -ive, -al, -ari, -ose, por tiri adjektivon el substantivo?

Ilustrajn ekzemplojn mi trovis el la germana, la hungara, la turka kaj la franca.

La aglutina karaktero de Esperanto estas pli ol evidenta, kio donas al ĝi konsiston ne latinan, eĉ ne eŭropan malgraŭ la latineco de tre multaj vortoj.

La verketo estas franclingva, tradukita el Esperanto de Sino Nicole Piron. Kiu scias la francan lingvon, legu ĝin. Ĝi havigas trafajn argumentojn kontraŭ tiuj modernaj lingvistoj, kiuj neniam studis funde Esperanton kaj ignoras facile ke la mondo estas lingve pli vasta ol la latinida rondo de Eŭropo.

Salvador Gumá

RAYMOND SCHWARTZ, Lia Vivo kaj Verkaro, de R. Bernard, kolekto «Studoj», n.º 4, 21 paĝoj. Fakoj: Biografio. Eldonejo: Kultura Centro Esperantista, Postiers 27, p.f. 771, CH-2301. La Chaux-de-Fonds. 1977. Prezo: 3,90 sv. fr.

La verko temas pri prelego prezentita de S-ro Roger Bernard ĉe Kultura Se-

majnfino de KCE, en kiu la aŭtoro priskribas la agadon en kabaredo kaj en poezia aktivado de R. Schwartz. Ĝi estas tre interesa broŝuro.

SOCIOPSIKOLOGIO KAJ GRUPODINAMIKO DE LA ESPERANTO-MOVADO, de Tazio Carlevaro. Kolekto «Studoj», n.º 7, 36 paĝoj. Eldonejo: Kultura Centro Esperantista, 1977. Prezo: 5 sv. fr.

La aŭtoro analizas kelkajn fenomenojn, kiuj pli-malpli regule manifestiĝas en la Esperanto-movado. Konkludas la verkon difin-terminaro el vortoj koncernantaj sociologion, psikologion, lingvistikon kaj interlingvistikon, kiuj troviĝas en tiu verko ja interesa.

SENNACIECA REVUO, n.º 105, jaro 1977. Eldono de S.A.T., 67 avenue Gambetta, Paris. 56 paĝoj, formato 17 x 21,5 cm. Prezo de la kajero 12 FF. aŭ 2,40 \$, aŭ egalvaloro.

Kiel kutime tre interesa eldonaĵo en bona lingvo.

62-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO. Kongresa Libro 1977. Eldono de U.E.A., 128 paĝoj, formato 13,5 x 20,5 cm.

Kiel kutime ĝi enhavas la programon kaj informojn pri la Kongreso kaj la kongresa lando, Islando.

4-a INTERNACIA KONFERENCO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

Jaca, Hispanio, 22 - 29 julio 1978

Korespondadreso: I. Gastón, P.º Marina Moreno, 35, 4.º dcha. Zaragoza-1. Hispanio

Kun ĝojo ni informas pri la decido de la 3-a Internacia Konferenco de NEM, akcepti nian inviton por okazigo de la 4-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado en Jaca venontjare.

Malfacila tasko estas por ni ĝia organizado, por ke ĝi estu inda en la vico de la jam okazintaj Konferencoj.

La intereso de la temaro kaj la prestiĝo kaj altaj kvalitoj de la antaŭviditaj prelegontoj, garantias la sukceson en la laboro. La beleco de la Pirineo kaj la situo de Jaca faciligas la organizadon de agrablaj ekskursoj. Do, ni konfidu...

La Organiza Komitato jam eklaboris.

Organiza Komitato

Miguel Sancho Izquierdo, prezidanto; Víctor Ortiz, vicprezidanto; Inés Gastón, sekretariino (kaj administraj aferoj); Carlos Boloix (ekskursoj kaj junularo); M.ª Pilar Sancho Rebullida (libroservo).

Jus aperis nova eldono de la konscienco-skua verko de

Ivo Lapenna

HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO

Dokumentoj kaj Materialoj pri la Kontraŭneŭtraleca Politika Konspiro en UEA

DUA KOMPLETIGITA ELDONO

Kopenhago, 1977

Presita, sama formato kiel *Retoriko, Esperanto en Perspektivo* k.a. verkoj de Ivo Lapenna
152 paĝoj

Prezo 45 danaj kronoj, 18 germ. markoj, 54 fr. fr. 650 pesetoj aŭ egalvaloro plus 10 % por la sendokostoj

Unuopaj ekzempleroj mendeblaj ĉe la Eldonejo, Amosevej 5A, 2700 Brønshøj Danlando; S-ro H. Müller, Mommsenstr. 5/I, Hannover, Germanio; S-ro Jean Thierry, 5, Rue Léon Cogniet, F-75017 Paris, Francio; F-ino I. Gastón, P.º Marina Moreno, 35, 4.º, Zaragoza, Hispanio; aŭ ĉe bonaj libroservoj.

Pli grandaj kvantoj mendeblaj nur ĉe la Eldonejo, Kopenhago, kun jenaj rabatoj: 33 % ĉe mendo de minimume 5 ekzempleroj, plus 10 % por sendokostoj; 33 % sen sen sendokostoj ĉe mendo de minimume 10 ekzempleroj.

HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO konsistas el Antaŭparoloj al la Unua kaj Dua Eldonoj, la tuta teksto de la unua eldono, naŭ gravaj aldonoj, tri pliaj lastmomentaj dokumentoj, Manifesto 77 kaj Indekso Persona. Laŭ la amplekso ĝi estas multe pli granda (je ĉ. du trionoj) ol la unua eldono. *Ciu leginto de la unua eldono devus havigi al si la duan, konsiderinde kompletigitan.*

HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO estas bele presita kun eleganta kovrilo, koncizaj informoj pri la aŭtoro kaj lia ĉefa verkaro en diversaj lingvoj. *Ciu posedanto de Retoriko, Aktualaj Problemoj, Elektitaj Paroladoj kaj Prelegoj certe legos kun streĉa intereso la novan libron, verkitan en la konate brila stilo de la aŭtoro, riĉigos siajn sciojn kaj.* La monumenta *ESPERANTO EN PERSPEKTIVO* nur en ligo kun *HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO* donas kompletan kaj objektivan bildon pri la atingoj de la Internacia Lingvo, pri ĝiaj realaj perspektivoj por la estonteco kaj pri la nuna stato de la Esperanto-Movado, kiu malrapidigas aŭ, eble, eĉ haltigos por ĉiam la realigon de la perspektivoj. *Ciu posedanto de ESPERANTO EN PERSPEKTIVO (ĉefverkinto kaj ĉefredaktoro I. Lapenna) estos plene informita sole per havigo kaj legado de HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO.*

MENDU TUI KAJ ATENTIGU VIAJN GEAMIKOJN

Aliaj verkoj de Ivo Lapenna

Retoriko, la plej legata libro de la postmilita periodo, jam pli ol 5.000 ekzempleroj disvenditaj, 3-a eldono, 294 p., bindita, prezo 6,50 anglaj pundoj, 65 D Kr. aŭ egalvaloro.

Elektitaj Paroladoj kaj Prelegoj, komplemento de *Retoriko*, 152 p., fortike broŝurita, prezo 3,50 angl. pundoj, 35 D Kr. aŭ egalvaloro.

Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo, popularscienca kaj interesa por ĉiu klera persono, 144 p., broŝurita, prezo 2,50 angl. pundoj, 25 DKr. aŭ egalvaloro.

Esperanto en Perspektivo (ĉefaŭtoro kaj ĉefredaktoro), reklamata de UEA kiel "enciklopedio de la nuna tempo", tamen ne kompleta sen *Hamburgo en Retrospektivo*, bindita, ilustrita, 876 p., ampleksaj persona kaj tema indeksoj, prezo 84 ned. gld. aŭ 212,50 DKr.

Ciuj supraj libroj estas en la sama formato de 20,5 × 14 cm.

La verkoj de Ivo Lapenna estas unueca tuto reflektanta la humanecan internaciismon de la aŭtoro kaj lian senfinan sindediĉon al la afero de la Internacia Lingvo.

La prezoj devos altiĝi la 1-an de januaro 1978. Tial mendu tuj ĉe nia *Libroservo-Kopenhago*, Amosevej 5A, 2700 Brønshøj, Danlando. Kun la escepto de *Esperanto en Perspektivo*, la librojn oni povas mendi ankaŭ ĉe la aŭtoro, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, HA9 8TF, Britio, laŭ la prezoj indikitaj en anglaj pundoj *Bv. ĉiam aldoni 10 % por la sendokostoj.*